

Mi vidis la magian butikon de malproksime, en diversaj okazoj. Mi estis pasinta apud ĝi, dufoje aŭ trifoje: butika fenestro kun logantaj objektoj, magiaj pilkoj, magiaj kokinoj, mirigaj konusoj, pupoj de ventroparolistoj, materialo por korba ĵonglaĵo, kartaroj, kiuj ŝajnis nepre naturaj, kaj la tuto de tiaj aferoj.

Uzino 5



UZINO 5

Legolibro kun originala

kaj tradukita beletro

Redaktis Franko Luin

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-201-8

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

MAJO 2003

Enhavo

Pri Uzino	4
La magia butiko (<i>H. G. Wells</i>)	5
Ĉu ekzistas anĝeloj? (4) (<i>John Einar Åberg</i>)	23
La etulo (<i>Guy de Maupassant</i>)	31
La kamizolo (<i>Boleslaw Prus</i>)	39
La notario de Périgueux (<i>H. W. Longfellow</i>)	54
Via momento sur la tero (<i>Vilhelm Moberg</i>)	64
La kafejo en Surat (<i>Lev Tolstoj</i>)	83
La trezoro en la arbaro (<i>H. G. Wells</i>)	95

Pri Uzino

Uzino estas legolibro kun variaj prozaj beletraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj. Kiel oni povas diveni el la nomo, ofte povas temi pri tekstoj daŭre prilaborataj, ĉapitroj el tradukataj romanoj, unuopaj noveloj, pli-malpli pretaj skizoj. Iujn oni povas trovi en alia formo en la interreto, aliaj aperas ĉi tie por la unua fojo. Ankaŭ tekstoj jam aperintaj en disaj gazetoj, sed malmulte konataj, povas trovi lokon en Uzino.

Ĉiu Uzino estos minimume 100-paĝa. Aŭtoroj, kiuj havas ion publikigindan povas sendi sian verk(er)on al uzino@omnibus.se.

Oni povas uzi ĉi tiun interretan medion por vekti la intereson de la legontoj, prezentante rakonton, novelon aŭ ĉapitron el originala aŭ tradukata romano, kies publikigo kuŝas en la fora estonteco.

Franko Luin

La magia butiko

Mi vidis la magian butikon de malproksime, en diversaj okazoj. Mi estis pasinta apud ĝi, dufoje aŭ trifoje: butika fenestro kun logantaj objektetoj, magiaj pilkoj, magiaj kokinoj, mirigaj konusoj, pupoj de ventroparolistoj, materialo por korba ĵonglaĵo, kartaroj, kiuj *ŝajnis* nepre naturaj, kaj la tuto de tiaj aferoj. Sed mi neniam pensis, ke mi iam ĝin eniros, ĝis kiam iun tagon, preskaŭ senaverte, Ĝip tiris min per mia fingro rekte al la fenestro, kaj kondukis tiamaniere, ke mi nepre devis lin enkonduki. Por diri la veron, mi ne pensis, ke la loko estas tiu ĉi, montra fenestro de modesta amplekso en Regent Street, inter la pentrobutiko kaj la loko, kie kokidetoj estas ĵus elirintaj el patentaj koviloj, — sed nun, ĝi estis tie, tre certe. Mi imagis, ke ĝi estas malsupre, pli proksime al la Cirko, aŭ ĉirkaŭ la angulo en Oxford Street, aŭ eĉ en Holborn; ĉiam trans la strato, iel nealirebla ĝi estis, kun iom da iluzio en sia starejo. Sed nun ĝi staris tie ĉi, nekontesteble, kaj la dika ekstremaĵo de la streĉita fingro de Ĝip faris bruon, sur la vitro.

—Se mi estus riĉa, — diris Ĝip, frapetante per la fingro al la "malaperanta ovo", — mi aĉetus ĉi tion por mi kaj tion, — kio estis nomita "ploranta infaneto tre homa", — kaj tion, — kio estis mistero nomita, beleta karto ĝin certigis, "Aĉetu unu kaj mirigu viajn amikojn".

—Io ajn, — diris Ĝip, — malaperos sub unu el tiuj konusoj. Mi legis pri tio en libro. Kaj tie, paĉjo, estas la "malaperanta groŝo". Nur, ili metis ĝin tiel alte, ke oni ne povas vidi, kiel ĝi estas farita..

Ĝip, kara infano, heredis la edukitecon de sia patrino, kaj li ne intencis eniri la butikon, aŭ tedi ajnmaniere; nur, tute nekonscie, li altiris mian fingron al la pordo kaj klarigis, kio lin interesas:

—Tion, — li diris, kaj montris la "magian botelon".

—Se vi posedus tion? — mi diris; kaj tiu promesplena demando igis lin rigardi supren per subite brilaj okuloj.

—Mi povus montri ĝin al Jessie, — li diris, malegoista kiel ĉiam.

—Malpli ol cent tagoj estos de nun ĝis la datreveno de via naskiĝo, Ĝiĉjo, — mi diris, kaj metis la manon al la pordoprenilo.

Ĝip respondis nenion, sed lia premo de mia fingro firmiĝis, kaj tiel ni eniris la butikon.

Tio ne estis ordinara butiko; ĝi estis magia butiko, kaj al Ĝip mankis la vigla supereco, kiun li posedus, pri simplaj ludiloj. Li do lasis al mi la taskon paroli.

La butiko estis malgranda, mallarĝa, ne tre bone lumi-gata, kaj la sonorilo de la pordo plende ektintis, kiam ni fermis ĝin post ni. Dum momento ni restis solaj, kaj povis rigardi ĉirkaŭ ni. Tigro el kartono staris sur la vitra kesto, kiu kovris la malaltan vendotablon — serioza, bonokula tigro, kiu balancadis sian kapon, laŭ metoda maniero; troviĝis kelkaj globoj el kristalo, porcelana mano tenanta magiajn kartojn, aro da magiaj fiŝvazoj, diverse grandaj, kaj senhonta magia ĉapelo, kiu maldece elmontris siajn risortojn. Sur la planko kuŝis magiaj speguloj: unu, por longigi kaj maldikigi vin, alia por ŝveligi vian kapon kaj malaperigi viajn krurojn, tria por igi vin mallonga kaj grasa. Kaj dum ni ridadis antaŭ tiuj speguloj, la estro, kiel mi supozas, eniris.

Li staris malantaŭ la vendotablo, stranga, brune flava viro, kun unu orelo pli granda ol la alia, kaj mentono kiel ekstremaĵo de ŝuo.

—Kion ni havos la plezuron?... — li diris, streĉante siajn longajn, magiajn fingrojn sur la vitra kesto.

Kaj tiel, kun skueto, ni eksciis pri lia ĉeesto.

—Mi deziras, — mi diris, — aĉeti por mia malgranda filo kelkajn simplajn ĵonglaĵojn.

—Lertecajn? — li demandis. — Mekanikajn? Hejmajn?...

—Ion ajn amuzigan, — mi diris.

—Um! — diris la vendisto, gratante sian kapon dum momento, kvazaŭ li pripensus.

Nun, tre videble, li eltiris el sia kapo vitran globon.

—Ion, kiel tion ĉi? — li diris, kaj prezentis ĝin.

La ago estis neatendita. Mi jam vidis la lertaĵon faratan en amuzejoj, multege da fojoj: ĝi estas parto de komunaj ĵongladoj — sed mi ne atendis ĝin tie ĉi.

—Bone, — mi diris, ridante.

—Ĉu ne? — diris la vendisto.

Ĝip streĉis sian liberigitan manon por preni la objekton kaj nur trovis malplenan manplaton.

—Ĝi estas en via poŝo, — diris la vendisto; kaj ĝi estis!

—Kiom tio kostas? — mi demandis.

—Ni ne petas pagon por vitraj globoj, — diris la vendisto afable, — ni ricevas ilin — li ekprenis unu el sia kubuto, dum li parolis — senpage.

Li eltiris alian el la malantaŭa parto de sia kolo, kaj metis ĝin apud la unua sur la vendotablo. Ĝip saĝeme rigardis sian vitran globon, poste rigardis demande al la du globoj sur la tablo, kaj fine direktis sian scivole rondigitajn okulojn al la vendisto, kiu ridetis.

—Vi ankaŭ prenu ambaŭ ĉi tiujn, — li diris, — kaj se vi ne rifuzos, unu el mia buŝo. Jen!

Ĝip mute konsiliĝis kun mi dum momento, kaj poste, profunde silenta, prenis la kvar globojn, rekaptis mian

kuraĝigan fingron, kaj streĉis sian nervaron, por la tuj venonta okazo.

—Ni ricevas ĉiujn niajn plej malgravajn ĵonglilojn tia-maniere, — la vendisto rimarkigis.

Mi ridis, kiel iu faciliganta bonan ŝercon.

—Anstataŭ iri al la pogranda butikio, — mi diris. — Kompreneble, ĝi estas malpli kosta!

—Iel, — diris la vendisto. — Tamen ni fine pagas. Sed ne tiel koste, kiel oni supozus ... Niajn pli grandajn ĵonglilojn, niajn ĉiutagajn provizojn, la ceterajn aferojn, kiujn ni bezonas, ni ĉerpas el tiu ĉi ĉapelo ... Kaj sciu, sinjoro, pardonu, ke mi diras tion, ekzistas *neniu* pogranda butikio, neniu, por komercaĵoj de natura magio, sinjoro. Mi ne scias, ĉu vi rimarkis nian titolon: "Butikio de natura magio". — Li eltiris vizitkarton el sia vango kaj prezentis ĝin al mi. — Natura, — li diris, kun sia fingro sur tiu vorto, kaj aldonis: — Nepre ekzistas neniu trompaĵo.

—Li ŝajnas daŭrigi la serĉon iel plene, — mi pensis.

Li turnis sin al Ĝip kun rideto rimarkinde afabla:

—Vi vere apartenas al la bona speco de knaboj.

Surprizis min, ke li scias tion, ĉar por savi disciplinon, ni kaŝas tion, eĉ hejme; sed Ĝip ricevis la komplimenton firme silenta, ĉiam fiksante al li siajn okulojn.

—Nur knaboj de la bona speco trairas tiun ĉi pordon.

Kaj, kiel por ilustra ekzemplo, okazis bruo ĉe la pordo, kaj alta voĉetaĉo maltaŭte aŭdebliĝis:

—Niaa! mi volas eniri ĉi tien, paĉjo, mi volas eniri ĉi tien! Niaa!

Kaj poste eksonis la voĉo de patro piedbatata, celanta konsolon kaj kvietigon.

—Ĝi estas fermita, Edward, — li diris.

—Sed ĝi ne estas ..., — mi diris.

—Ĝi estas, sinjoro, — diris la vendisto, — ĉiam, por liaspecaj knaboj.

Kaj, dum li paroladis, ni momente vidis la alian junulon malgrandan, blankvizaĝan, palan pro sukeraĵoj kaj tro bongusta nutraĵo, grimacan pro malbonaj pasioj, egoistuleton senkompatan, kiu piedfrapis la ensorĉitan pordon.

—Neutile, sinjoro, — diris la vendisto, kiam mi ekmoviĝis al la pordo, pro mia natura servemo; kaj nun la malbone edukata infano estis fortrenata, blekante.

—Kiel vi faras tion? — mi diris, spirante iom pli libere.

—Magio! — diris la vendisto, kun sencela mangesto, kaj, nu! koloraj fajreroj ekflugis el liaj fingroj kaj malaperis en la ombrojn de la butikoj.

—Vi diris, — li parolis turnante sin al Ĝip, — antaŭ ol eniri ĉi tien, ke vi dezirus havi unu el niaj skatoloj: "Aĉetu unu kaj mirigu viajn amikojn"?

Ĝip, post brava klopodo, diris:

—Jes.

—Ĝi estas en via poŝo.

Kaj streĉante sin super la tablo, — li vere havis eksterordinare longan korpon, — tiu miriga viro prezentis la aferon, laŭ la kutima maniero de ĵonglistoj.

—Papero, — li diris, kaj prenis folion el la malplena ĉapelo kun risortoj; — ŝnureto, — kaj nu, lia buŝo fariĝis ŝnuretskatolo, el kiu li tiradis senfinan fadenon, kiun li mordante detranĉis, ĉirkaŭliginte la pakon, kaj ..., ŝajnis al mi, englutis la ŝnuretvolvejaĵon.

Poste, li ekbruligis kandelon, ĉe la nazo de unu el la pupoj de la ventroparolisto, enmetis unu el siaj fingroj (kiu fariĝis ruĝa sigelvakso) en la flamon, kaj tiel sigelis la pakon.

—Nun, la "malaperanta ovo", — li rimarkigis, kaj, eltirinte unu el mia brusto, enpakis ĝin, kaj ankaŭ la "plorantan infaneton tre homan".

Mi donis ĉiun pakon al Ĝip, kiam ĝi estis preta, kaj li premis ilin sur sia brusto.

Li tre malmulte parolis, sed liaj okuloj estis elokventaj; la premado de liaj brakoj estis elokventa. Li estis la scenejo de nedireblaj sentoj. Komprenu, reala magio!

Nun, tremetante mi konstatis, ke io moviĝas en mia ĉapelo — io mola kaj saltema. Mi deprenis la ĉapelon, kaj ekscitita kolombo — sendube kunkonspiranto, elflu-

gis, kuris sur la vendotablo, kaj sin kaŝis, mi kredas, en kartonan skatolon malantaŭ la tigro.

—Ho! Ho! — diris la vendisto, lerte kaptante mian ĉapelon, — senzorga birdo, kaj, vere kiel mi vivas, demetinta ovojn!

Li skuis la ĉapelon, kaj faligis en sian etenditan manon du aŭ tri ovojn, grandan ludglobon, poŝhorloĝon, proksimume seson da neeviteblaj vitraj globoj, kaj poste ĉifitan, zigzagan paperon, pli kaj pli kaj pli, — dum li senhalte parolis pri tio, ke oni ne zorgas brosi sian ĉapelon *ene* kiel ekstere. Ĝentile li parolis, sed kun ia persona aludo:

—Ĉiuspecaj aferoj arigitaj, sinjoro ... Ne vi speciale, kompreneble. Preskaŭ ĉiu kliento ... Mirige, kion oni portas kun si ...

La ĉifita papero montiĝis kaj ŝveliĝis kiel ondo sur la pagtablo pli kaj pli kaj pli, ĝis kiam li preskaŭ kaŝiĝis de ni, ĝis kiam li tute kaŝiĝis, kaj ankoraŭ lia parolado daŭris.

—Neniu el ni scias, kion la bela ŝajno de homa estaĵo povas kaŝi, sinjoro. Ĉu ne ni ĉiuj estas nur brositaj eksterajoj, blankaj tomboj ...?

Lia voĉo eksilentis, kvazaŭ vi frapus la fonografon de via najbaro per precize celanta ŝtono. Fariĝis la sama silento, la bruado de la papero haltis, kaj ĉio estis kvietita ...

—Ĉu vi ne plu bezonas mian ĉapelon? — mi diris, post iom da tempo.

Neniu respondo.

Mi rigardis Ĝipon, kaj Ĝip rigardis min, kaj estis niaj aliformigitaj figuroj en la magiaj speguloj, kiuj vidiĝis tre strangaj, seriozaj, trankvilaj ...

—Mi pensas, ke ni foriros nun, — mi diris. — Bonvolu diri al mi, kiom kostas la tuto ...?

—Mi diras, — mi pli laŭte ripetis, — mi deziras la kalkulon; kaj mian ĉapelon, mi petas ...

Eble estis spirbrueto, malantaŭ la amaso da papero ...

—Ni rigardu malantaŭ la vendotablo, Ĝip, — mi diris. — Li mokas nin!

Mi kondukis Ĝipon ĉirkaŭ la kapobalancanta tigro, kaj kion vi pensas, ke ni trovis malantaŭ la vendotablo? Nepre neniun! Nur estis mia ĉapelo sur la planko, kaj blanka kuniklo de ĵonglisto, kun pendantaj oreloj, en profunda meditado; ĝi ŝajnis malsprita kaj atrofia, kiel nur povas esti kuniklo de ĵonglisto. Mi reprenis mian ĉapelon, kaj la kuniklo saltetis for de mia paŝo.

—Paĉjo, — diris Ĝip, kun kulpa sopiro.

—Kion? Ĝip, — mi diris.

—Mi *amas* ĉi tiun butikon, Paĉjo.

—Mi ankaŭ amus, — mi diris al mi mem, — se la vendotablo ne subite etendiĝus, disigante nin de la pordo.

Sed mi ne igis Ĝipon atenti pri tio.

—Kuĉjo, — li diris, kun mano al la kuniklo, kiu salte-
tis foren. — Kuĉjo, faru al Ĝip magiaĵon!

Kaj liaj okuloj sekvis ĝin, dum ĝi kunpremiĝis tra iu
pordo, kiun mi tre certe ne rimarkis pli frue. Nun tiu
pordo malfermiĝis pli large, kaj la viro, kun unu orelo pli
granda ol la alia, reaperis. Li ankoraŭ ridetis, sed liaj
okuloj renkontis miajn, kun io inter amuzado kaj malfi-
dado.

—Vi deziras vidi nian ekspoziciejon, sinjoro, — li di-
ris, kun senkulpa ĝentileco.

Ĝip tiris mian fingron antaŭen. Mi rigardis la vendo-
tablon kaj ree renkontis la okulon de la komercisto. Mi
komencis opinii, ke la magio estas iel tro natura.

—Ni ne havas *multe* da tempo, — mi diris.

Tamen, ni estis en la ekspoziciejo, antaŭ ol mi povis
fini tiun frazon.

—Ĉiuj komercaĵoj de la sama kvalito, — diris la ko-
mercisto, kunfrotante siajn flekseblajn manojn, — kaj tiu
kvalito estas la plej bona. Nenio ĉi tie, kio ne estas na-
tura magiaĵo, garantiite nepre originala. Pardonu min,
sinjoro!

Mi sentis, ke li detiras ion, kio kroĉiĝis al mia maniko,
kaj nun mi vidis, ke li tenas, per ĝia vosto, baraktantan
ruĝan demoneton. La estaĵeto mordis, batalis kaj celis
kapti lian manon, kaj, post momento, li ĵetis ĝin senzor-
ge malantaŭ tablon. La afero estis sendube nur figuro el

tordita kaŭĉuko, sed dum momento! ... Kaj lia gesto estis precize kiel de viro, kiu tenas iun naŭzan insekteton! Mi rigardis al Ĝip, sed Ĝip rigardadis al magia balanciĝanta ĉevalo. Mi estis kontenta, ke li ne vidis la aferon.

—Diru, — mi diris, mallaŭte, kaj montrante per miaj okuloj Ĝipon kaj la ruĝan demoneton, — vi ne havas ĉe vi multe da aferoj *tiaspecaj*, ĉu?

—Ne estas nia! Sendube vi alportis ĝin kun vi, — diris la komercisto, ankaŭ mallaŭte, kaj kun rideto pli brila ol ĉiam. Strange, kion oni alportas senatente kun si — Kaj nun, al Ĝip: — Ĉu vi vidas ion, kio plaĉas al vi, ĉi tie?

Estis multaj aferoj, kiuj plaĉis al Ĝip, tie. Li turnis sin al tiu miriga komercisto, kun miksitaj fido kaj respekto.

—Ĉu tio estas magia glavo? — li diris.

—Magia ludglavo. Ĝi neniam fleksiĝas, rompiĝas aŭ vundas la fingrojn. Ĝi igas sian posedanton nevenkebla de iu ajn, ne ankoraŭ dekokjara. Ses ĝis sep kaj duona ŝilingoj, laŭ grandeco. Tiuj armilaroj sur kartonaĵoj taŭgas por junaj erarantaj kavaliroj, kaj estas tre utilaj: ŝildo saviga, ŝuoj rapidigaj, kasko nevidebliga.

—Ho! Paĉjo, — elspiradis Ĝip.

Mi provis ekscii, kiom ili kostas, sed la komercisto ne atentis min. Li nun estis kaptinta Ĝipon; li estis kaptinta lin de mia fingro; li entreprenis montri ĉion el sia malbenita komercaĵaro, kaj nenio povis lin haltigi. Nun mi vidis, kun naŭziga malfido, kun io tre simila al ĵaluzo, ke

Ĝip prenis la fingron de tiu viro, kiel kutime li premas mian. La viro sendube estas interesa, mi pensis, li havas interesan aron da komercaĵoj, vere *bonajn* komercaĵojn, tamen ...

Mi paŝis malantaŭ ili, parolante tre malmulte, sed ĉiam observante tiun sorĉeman viron. Almenaŭ Ĝip ĝojis. Kiam la tempo venos, ni povos sendube foriri tute facile.

Estis longa, labirinta loko, tiu ekspoziciejo, galerio, kiun interrompis tabloj kaj kolonoj, kun arkaĵoj kondukantaj al aliaj vendejoj, de kie la plej strangaj komizoj rigardis vin. Estis erarigaj speguloj kaj kurtenoj. Vere, tiel ili erarigis, ke mi baldaŭ ne plu povis rekoni la pordon, tra kiu ni eniris.

La komercisto montris al Ĝip magiajn vagonarojn, kiuj kuris sen vaporo aŭ horloĝa mekanikaĵo, tuj kiam vi signodonis; kaj poste tre, tre preciozajn skatolojn da soldatoj, kiuj ekvivis, tuj kiam vi deprenis la kovrilon kaj diris ... Mi mem ne havas tre rapide kaptantan orelon, kaj ĝi estis iu sono, kiu tordis la langon, sed Ĝip — li havas la orelon de sia patrino — tuj kaptis ĝin.

— Brave! — diris la komercisto, remetante senceremonie la soldatojn en la keston, kaj prezentante ĝin al Ĝip.
— Nun! — diris li, kaj tuj Ĝip revivigis ilin.

— Ĉu vi prenos tiun skatolon? — diris la komercisto.

—Ni prenos tiun skatolon, — mi diris, — se vi ne postulas ĝian realan valoron. Tiukaze, sole povus Trustestro ...

—Dio! *Ne!* — Kaj la komercisto reenigis la soldatetojn, fermis la kovrilon, balancis la skatolon en la aero, kaj jen ĝi estis, en bruna papero, ligita, *kun la plena nomo kaj adreso de Ĝip sur la papero!*

La viro ekridis pro mia miriĝo.

—Tio estas natura magio, — li diris, — la afero mem!

—Iom tro natura por mia gusto, — mi ree diris.

Poste li montris al Ĝip lertaĵojn, strangajn lertaĵojn, kaj eĉ pli stranga estis la maniero, laŭ kiu ili estis farataj. Li klarigis ilin, renverse montris la ilojn, kaj jen estis la kara knabeto, kiu balancis sian penseman kapeton laŭ la plej saĝa maniero.

Mi ne atentis tiel bone, kiel mi povus.

—He! Presto! — diris la magia komercisto, kaj poste aŭdiĝis la neta voĉeto de la knabo, ripetante: — He! Presto!

Sed min distris aliaj aferoj. Naskiĝis en mi la ideo, kiel terure stranga tiu loko estas; ĝi estis, se estas tiel direble, superakvita per ŝajno de strangeco. Estis io strangeta, eĉ en la mebloj, sur la plafono, sur la parkedo, sur la senorde starantaj seĝoj. Mi havis la strangan senton, ke, kiam mi ne plu rigardas al ili, ili tuj aliformiĝas kaj ekmoviĝas, kaj silente ludas "kaŝu vin" malantaŭ mia dor-

so. Plie, la kornico havis serpentan desegnaĵon kun maskoj — maskoj nepre tro esprimemaj se el reala gipso.

Tiam mian atenton kaptis unu el la strangaj komizoj. Li staris iom malproksime, tre certe nescianta mian ĉeeston, — mi vidis proksimume tri kvaronojn de li, super amaso da ludiloj, tra arkaĵo, — kaj li apogis sin kontraŭ kolono, kvazaŭ senokupa, farante la plej abomenajn aferojn per sia vizaĝo. Specialan abomenaĵon li faris per sia nazo. Li faris tion, kvazaŭ li, senokupa, dezirus amuziĝi. Komence, ĝi estis mallonga dika nazo, kaj subite li antaŭlongigis ĝin, kiel teleskopon, poste ĝi flugadis kaj fariĝis pli kaj pli maldika, ĝis kiam ĝi fariĝis longa, ruĝa, fleksebla vipo. Estis same kiel afero en terursonĝo! Li balancis kaj ĵetis ĝin antaŭen, kiel fiŝkaptisto ĵetas sian hokfadenon.

Mia penso estis, ke Ĝip ne vidu tion. Mi deturnis min, kaj tie staris Ĝip, tute okupata de la komercisto, sen malbonaj pensoj. Ambaŭ mallaŭte parolis kaj rigardis al mi. Ĝip staris sur malalta benketo, kaj la komercisto tenis grandan tamburon en sia mano.

—Kaŝu, serĉu, paĉjo! — ekkriis Ĝip. — Vi serĉu!

Kaj antaŭ ol mi povis ion fari por malhelpi tion, la komercisto metis la grandan tamburon ĉirkaŭ li. Mi komprenis, kio tuj okazos.

—Deprenu tion, — mi kriis, — nun! Vi timigos la infanon! Deprenu ĝin!

La komercisto kun malsamaj oreloj faris tion, sen unu vorto, kaj prezentis al mi la vastan cilindron, por montri ĝian malplenecon. Kaj la malalta benketo estis dezerta! Dum tiu momento, mia knabo estis nepre malaperinta! ...

Vi eble konas tiun funebran ion, kiu venas kiel mano el la nevideblaĵo kaj ĉirkaŭpremas vian koron. Vi scias, ke tio neniigas vian ordinaran memon, kaj igas vin streĉita, decida, nek malfruema nek trorapida, nek kolera nek timigita. Tiel estis rilate al mi.

Mi alpaŝis al tiu grimaca komercisto, kaj piede forĵetis lian benketon.

—Haltigu tiun sensencaĵon! — mi diris. — Kie estas mia knabo?

—Vi vidas, — li diris, ree montrante la internaĵon de la tamburo, — estas neniu trompo ...

Mi antaŭenigis mian manon por kapti lin, kaj li liberigis sin per lerta movo. Mi ree kaptis, kaj li deturnis sin malfermante pordon por forkuri.

—Haltu! — mi diris; kaj li ridis, flugante.

Mi saltis post li, en plenan mallumon ...

Bum!

—Dio mia! mi ne vidis vin veni, sinjoro!,

Mi staris en Regent Street, kaj mi estis puŝinta laboriston de deca ŝajno; je unu metro, eble, ŝajne iom embarasita, staris Ĝip. Estis ia peto de pardono, kaj tiam

Ĝip turnis sin kaj venis al mi kun brila malgranda ride-to, kvazaŭ li estus perdinta la vidon de mi dum momen-to.

Kaj li portis kvar pakojn en siaj brakoj! Li tuj reprenis mian fingron.

Dum sekundo mi sentis min iom embarasita. Mi ĉir-kaŭrigardis, por vidi la pordon de la magia butikio, sed nu! ĝi ne plu vidiĝis tie! Ne plu estis pordo, butikio; ne-nio. Nur la ordinara kolono, inter la butikio, kie oni ven-das pentraĵojn, kaj la fenestro kun kokidoj ...

Mi faris la solan agon eblan, en tia anima tumulto. Mi paŝis rekte al la rando de la trotuaro kaj supretenis mian pluvombrelon, signodone al fiakro.

—Fiakro! — ekkriis Ĝip, kun voĉo de treega plezuro.

Mi helpis lin eniĝi, klopodis rememori mian adreson, kaj eniĝis ankaŭ. Io nekutima atentigis min pri sia ĉeesto en la poŝo de mia frako, kaj mi, palpinte, ektrovis vitran globon. Kolere mi ĵetis ĝin sur la straton.

Ĝip diris nenion.

Dum kelka tempo neniu el ni parolis.

—Paĉjo, — diris fine Ĝip, — ĝi estis bela butikio!

Tiuj vortoj kondukis min al la problemo ekscii, kiel la tuta afero ŝajnis al li. Li vidiĝis nepre sendifekta — tio, almenaŭ, estis bona; li estis nek vundita nek malkvieti-gita, li nur estis eksterordinare kontenta pro la amuza-do de la tago, kaj en liaj brakoj troviĝis la kvar pakoj ...

Ilin al diablo! Kion ili povis enteni?

—Um! — mi diris, — knabetoj ne povas iri al tiaj butikoj ĉiutage.

Li akceptis tion kun sia kutima stoikeco, kaj, dum momento mi bedaŭris, ke mi estas lia patro, ne lia patri-no, kaj ke mi ne povas kisi lin, *coram publico*, en nia fia-kro. Ĉiel, la afero ne estis tiel malbona.

Sed nur kiam ni malvolvis la pakojn, mi vere komen-cis tute rekvietiĝi. Tri el ili entenis kestojn da soldatoj, tre ordinaraj soldatoj, sed de kvalito sufiĉe bona por igi Ĝipon tute forgesi, ke, pli frue, tiuj pakoj estis magiaĵoj de la nura natura speco. La kvara entenis katidon, vivan katideton, de plej bona farto, apetito kaj karaktero.

Mi ĉeestis al tiu elpakigo kun speco de provizora retranskribiĝo.

Mi restis en la infanejo dum nepre nepermesebla daŭro ...

Tio okazis antaŭ ses monatoj. Nun, mi komencas kredi, ke ĉio kontentige finiĝis. La katido nur havis la magion naturan de ĉiuj katidoj, kaj la soldatoj ŝajnas esti tiel kvietaj militistaro, kiel ajna kolonelo dezirus. Kaj Ĝip ...?

La inteligenta patro komprenos, ke mi devas singardeme agi, rilate al Ĝip.

Sed mi iris ĝis tio ĉi: iufoje mi diris:

—Ĉu vi amus, se viaj soldatoj viviĝus, Ĝip, kaj paŝus senhelpe?

—Miaj faras tion, — diris Ĝip. — Mi nur bezonas elparoli vorton, kiun mi konas, antaŭ ol malfermi la kovrilon.

—Kaj tiam, ili senhelpe paŝadas?

—Ho! tute jes, Paĉjo! Mi ne amus ilin, se ili tion ne farus.

Mi montris nenian nedecan surprizon, kaj de tiam, mi unufoje aŭ dufoje trovis okazon iri al li, ne anoncote, kiam li estis okupata kun la soldatoj, sed ĝis nun, mi neniam surprizis, ke ili faras ion laŭ magia maniero ...

Estas tiel malfacile diri ...

Ankaŭ estas mona demando. Mi neresanigeble kutimas pagi fakturojn. Mi kelkfoje iris supren kaj malsupren laŭ Regent Street, serĉante tiun butikon. Mi inkliniĝas opinii, verdire, ke rilate tio, mia honoro estas kontentigita. Ĉar la nomo kaj adreso de Ĝip estis konitaj de ili, mi tre hone povas lasi al tiuj personoj, kiuj ajn ili estas, la zorgon sendi sian fakturon, kiam plaĉos al ili.

H. G. Wells

El angla lingvo tradukis Raoul Bricard

Ĉu ekzistas anĝeloj? (4)

Ĉefe pri vestaĵoj

Jan kaj Hagson tagmanĝis kune kaj ili renkontiĝis ĉiun tagon. Por Hagson estis agrabla devo pridemandi Jan pri lia laboro kaj doni al li valorajn proponojn. Li estis atentema kaj ne menciis profesoron Hopkins kaj lian ĉefverkon, *La arto atingi sukceson*, ĉar li sentis, ke io povus okazi ĉiun fojon, kiam tiu ulo estus preparolata.

Estis evidente, ke Jan posedas pli da naciriĉaĵoj ol ordinara bankpedelo povas prifanfaroni, ĉar li neniam havis la saman kostumon sur si du tagojn sinsekve. Li aspektis ĉiam novekipita.

Hagson ankaŭ menciis tion. Pri tio kulpis Margareta Günter. Ŝi paradis per vestaĵoj, kaj li malŝatis ŝin.

Li diris:

—Kiam vi havas postenon kian vi havas, vi ne iru en elegantaj vestaĵoj. Ili fariĝos nur detruitaj.

—Profesoro Hopkins diras ...

—Mi sendas al diablo profesoron Hopkins, Hagson rapide interrompis. Ni parolis pri vestaĵoj.

—Mi havas un kostumon po ĉiu labortago, sume ses, kaj bluan laborveston dum dimanĉoj, Jan respondis. Hopkins diras, ke a kaj z de sukceso estas belaj vestaĵoj. Estas pli bone esti bele vestita kaj idioto ol malzorga kaj geniulo. Kaj kiam mi rakontis tion por panjo ...

—Ĉu vi ne havas patron, Hagson denove interrompis.

—Li mortis, kiam mi estis malgranda.

Li silentis kaj sulkigis la frunton, kaj Hagson, kiu kredis, ke Jan dediĉas al sia mortinta patro silentan minuton, klopodis aspekti kunsuferanta.

Kun sulkita frunto Jan daŭrigis:

—Kiam mi estis unujara. Li diris, ke tuj kiam li eniras oficejon, li povas diri, kiu estas la homo kun perspektivoj. Li nur ĵetas rigardon al la vestaĵoj. Kaj tiam panjo diris: Aĉetu, kion vi bezonas.

Hagson rapide demetis la kunsufermieron.

—En tiu kazo, li diris embarase, ekzistas iu certa persono en la banko, kiu ankaŭ legis Hopkins. Ŝi nomiĝas Margareta Günter kaj ŝi ne fariĝos io plia, kiom ajn ŝi maskas sin.

—Margareta Günter, Jan diris postpripense. Tio sonas agrabla. Kiu ŝi estas?

—Iru al pruntoj kaj flaru, kaj vi venos rekte al ŝi. Vi ne povos erari pri la odoro. Sed tenu viajn fingrojn sub kontrolo, ŝi havas fianĉon.

—Nuntempe la knabinoj ofte havigas al si fianĉojn por ne bezoni pensi pri amo, ĉu vi ne scias?

Sed Hagson opiniis, ke viro kun dekduo da atlantik-ŝipoj kaj Alfa Romeo povas taŭgi ankaŭ tage. Ne estis facile frakasi Jan.

Li diris:

—Ŝajnas, ke ŝi legis Hopkins. Mi devos rigardi ŝin.

Ekzistas viroj, kiuj pli malfacile elektas inter kravatoj, kiujn ili surhavas unu posttagmezon, ol inter virinoj, kiujn ili devos toleri la tutan vivon. Ili povas stari dum horoj kaj heziti inter ruĝa kaj bruna kravatoj, por fine elekti grizan. Sed starigu cent virinoj antaŭ ilin kaj ili faras sian elekton en du nuraj sekundoj.

Tia Jan estis. Estis tiom da agrablaj kaj afablaj knabinoj, kiujn oni povis rigardi en la banko, sed post kiam li ekvidis Margaretan Günter, li ne havis okulojn por iu alia.

Jam la saman posttagmezon li venis kure al Hagson.

—Kial vi ne diris tion pli frue! li ekkriis. Ŝi aŭ neniu.

Antaŭ ol Hagson komprenis, li sentis la alvenantan katastrofon.

—Pri kio vi deliras?

—Margareta Günter! Kia virino! Ke mi ne vidis ŝin pli frue!

Hagson rigardis lin kun malbonvolo.

—Ne estas multo rigardinda. Estas nur vestaĵoj!

—Sed kian figuron ŝi havas! Li vidigis sian komprenon per la manoj, fariĝis io, kio similis al panbulko, kaj nenio povus esti pli erara.

—Jes, ĝi estas terura, Hagson diris kaj ankaŭ helpuzis la manojn, per kiuj li desegnis rektan strekon. Ŝi estas kiel skeleto. Kie aliaj virinoj havas mamojn, ŝi havas du verukojn. Li montris per ambaŭ montrofigurojn.

—Ŝi estas tiel bela! Jan daŭrigis sian melodion. Kaj tiel bone odoras de ŝi!

Hagson ne ĉesis.

—Kompreneble ŝi odoras, kiam ŝi dronigas sin en parfumo. Kaj la beleco estas surpentrita, ĝi forfalas en akvo kaj sapo. Ne, kredis al miaj vortoj, estas nur la vestaĵoj!

—Kaj kiaj ridtruetoj! Jan diris reve.

—Ridtruetoj! Hagson estis sincere kolera. Jes, en la postaĵo! Sakojn sub la okuloj ŝi havas! La tuta vango tiriĝas supren, kiam ŝi ridaĉas. Ĉu vi neniam fosis en sablo?

Jan estis surda. Tiam Hagson ekuzis sian lastan argumenton.

—Vi falis en la truon de Hopkins, ĉu vi ne rimarkas! Estas nur vestaĵoj!

—Jes, sed tio pruvas, ke li pravas, Jan diris, kaj fine Hagson komprenis, ke estas senutile daŭrigi.

—Kion bankpedelo devas fakte scii? Jan demandis al Hagson, ĉar li ne havis ian superrigardon pri la laboro, kaj Hagson tuj respondis.

—Ĉion!

Poste li klarigis plenvorte.

—Li devas esti perfekta lignaĵisto, pentristo, elektrikisto, kamenpurigisto, maŝinisto, riparisto, vartisto, akuŝisto kaj ŝoforo. Li devas koni la trafikregularon, poŝtregularon, ĉekleĝaron kaj kambioleĝaron. Li devas esti rapida kiel centmetrulo, persista kiel maratonulo kaj forta kiel urso. Li devas esti mola kiel patrino kaj severa kiel patro. Li devas scii ĉion pri la klientoj, tiel ke li, kiam ili telefonas pri la lasttagaj kambioj, povas bleki, postuli, petegi aŭ ameme memorigi, tute laŭ la situacio. Kaj ĉar li ofte havas delikatajn taskojn en la urbo, li prefere havu kelkajn jarojn da laboro kiel diplomato malantaŭ si. Fine li ankaŭ devas havi privatriĉaĵon, tiel ke li povas vivi je la salajro, kiun li ricevas.

—Ŝajnas, ke estas malfacile fariĝi plene edukita pedelo, Jan diris.

—Estas bezonata pli ol homa vivo por fariĝi tio, Hagson diris kun metifero.

Hopkins nenie en sia libro menciis, ke oni sukcesu per sia laboro. Aŭ li forgesis tion, aŭ li opiniis tion senutila. Jan miris, kion Hagson opinias pri tio.

—Li eble tamen estas saĝa ulo, Hagson diris.

La kaŭzo de tiu interparolo okazis unu tagon pli frue.

La antaŭan tagon Jan komencis praktiki ĉe Clemens. Clemens estis ĉefo super tiu sekcio, kiu nomiĝas presejo. Tiu sekcio enhavis citografon, mimeoaparaton kaj fotostaton.

Clemens estis, kiel Hagson tuj rimarkigis, mallaborema diablo.

Posttagmeze venis grava cirkulero, kiu kopiiĝu por la kontorestroj. Estis konfidenca informo de la bankdirekcio. Kun bedaŭro ili konstatis ke ilia plej grava konkurento, AS Okcidentborda Banko, forlasis la privatan interkonsenton de ambaŭ bankoj postuli ses procentojn de spezokambioj kaj kaŝe ekuzis kvin kaj duonon. Pluraj klientoj rimarkigis, ke laambio-diskonto estis pli malalta en Okcidentborda Banko, kaj kaŭze de tio la kontorestroj ricevis liberajn manojn. En speciale delikataj kazoj ili rajtis iri ĝis kvin procentoj.

La afero urĝis kaj la cirkulero devos foriri per la poŝto jam la saman tagon.

—Preparu ĝin, dum mi eliras por kafumi, Clemens diris.

La unuan fojon en sia vivo Jan vidis mimeoaparaton. Li foprenis la jakon kaj perdis manumbutonon en la aparaton. Okazis tiel maltaŭge, ke en sian klopodoj el-tiri la butonon, li tute difektis la aparaton.

Clemens ne ŝatis rapidajn kafumadojn. Kiam li finfine revenis, la afero estis je la sama punkto, kiel kiam li for-iris, kun la escepto ke Jan perdis manumbutonon kaj de-truis multekostan maŝinon. Tio estis iom ĉagrena.

Sed Clemens konstatis tion vere kviete. Li povis fari tion. La aparato ne estis lia, kaj li ne kulpis.

—Mi iras al mia kuzo, li estas pedelo en Okcidentbor-da Banko kaj igos lin multoblige la fekaĵon, li diris, post kiam li kviete prenis la elskribaĵon kaj iris al la Okcident-borda Banko, kiu situis du kvartalojn for. Ne estis ia ajn dubo, ke Clemens, dum la kuzo laboris, reiris al kafuma-do.

Kiam Clemens revenis al sia banko kun la kopioj, li povis informi, ke Okcidentborda Banko jam antaŭ se-majno sendis tute egalan cirkuleron al siaj kontorestroj; kun la diferenco, kompreneble, ke laŭ tiu cirkulero AS Haringobanko konkurencis mallojale.

—Ĉu vi ankaŭ kutimas helpi vian kuzon? Jan deman-dis.

—Kompreneble, Clemens diris, ni bankpedeloj kunla-boras.

Jan demandis al Hagson pri tio. Li tute ne aspektis surprizita.

—Sed ĉu la direkcio ne ekscias pri la cirkuleroj?

—Ĉu vi perdis vian prudenton, Hagson ekkriis. Ĉu vi neniam aŭdis pri banksekreteco?

John Einar Åberg

Kvara ĉapitro el samtitola romano

El la sveda tradukis Franko Luin

La etulo

Sinjoro Lemonier havis infanon kaj vidviĝis. Sian edzinon li estis aminta arde, pasie, kareseme, plene dum la tuta kunvivado. Li estis bonkora, honesta, simpla, tre simpla viro, verama, fidema kaj bonfarema.

Iam li enamigis al malriĉa najbarino, petis ŝian manon, kaj sin ligis edze al ŝi. Drapkomerco sufiĉe bone prosperis al li, monon li gajnis, kaj ne dubis unu sekundon, ke li estis akceptita pro si mem de la junulino.

Cetere ŝi igis lin feliĉa. Nur ŝin li atentis en la mondo, nur pri ŝi li pensis, kaj senĉese okulumis al ŝi per okuloj de respekta adoranto. Dum manĝo, prefere ol malrigardi la amatan vizaĝon, li faris mil mallertaĵojn, verŝis vinon en sian teleron kaj akvon en la salujon, poste ekridis kiel infano, ripetante:

—Mi tro amas vin, kaj fariĝas malsaĝa.

Ŝi ridetis serene, rezignacie, kaj preterigis la rigardon, kvazaŭ ĝenata de la edza adorado. Ŝi klopodis lin paroligi, penante babili pri io ajn, sed li kaptis ŝian manon trans la tablo, ame premis ĝin en sian kaj susuris:

—Janjo kara, Janeto mia!

Fine ŝi malpacientiĝis, kaj ordonis:

—Nu, esta saĝa, manĝu, kaj lasu min manĝi.

Li ĝemveis, derompis panpeceton, longe maĉadis ...

Kvin jarojn ili vivis senidaj. Subite ŝi gravediĝis. Estiĝis delira ĝojo. Li ne forlasis ŝin eĉ unu momenton dum la tuta gravedtempo, tiel ke lia servistino, maljuna servistino, kiu edukis lin dum lia infanaĝo kaj mastrece parolis en la hejmo, plurfoje forpelis lin eksteren, fermante la pordon, por ke li devige spiru iom da freŝa aero.

Li intime amikiĝis kun oficeja subestro ĉe la prefektejo, juna viro, kiu koniĝis kun lia edzino en la tempo, kiam ili estis geknaboj. Sinjoro Reven manĝis tri fojojn semajne ĉe sinjoro Lemonier, kunportis florojn al la sinjorino kaj iafoje loĝibileton por la teatro; ofte dum la deserto tiu bona Lemonier sin turnis al sia edzino kaj kurtuŝe sentencis:

—El kunulino kiel vi, kaj amiko kiel li konsistas plena surtera feliĉo.

Dum la akuŝo ŝi perdis la vivon. Li preskaŭ mortis pro ĉagreno, sed kuraĝiĝis rigardante la infanon, etulon kuntiriĝintan kaj ĝemantan.

Li amis lin per amo pasia kaj dolora, amo malsana, en kiu restis mortomemoro, sed kie postvivis io el lia adorado al la mortintino. Tiu infano estis karno de la edzino, ŝia daŭrigata esto, kvazaŭa kvintesenco de ŝi, ŝia vivo

mem pasinta en alian korpon; ŝi estis malaperinta, por ke li vivu. Kaj la patro lin kisis fervore. Sed kial mortigis ŝin tiu infano? Kial li prenis tiun adoratan ekziston, sin iintrinte per ĝi; kial li fortrinkis ŝian vivon? Kaj sinjoro Lemonier remetis sian filon en la lulilon, sidiĝis apude, kaj admire lin rigardadis. Tie li sidadis dum longaj horoj, pensante pri mil dolĉaj aŭ malgajaj aĵoj. Poste, kiam la etulo dormis, li sin klinis al lia vizaĝo, kaj larmadis en liaj puntaĵoj.

La infano kreskis. La patro, ne plu povante resti for de li eĉ unu horon, vagadis ĉirkaŭ li, promenigis, vestis, purigis, manĝigis lin. Lia amiko sinjoro Reven ankaŭ montris grandan amon al la knabeto, kiun li kisis kun kisoj de furioza amemo kutimaj al gepatroj.

Li igis lin salteti inter siaj brakoj, danci rajde dum horoj sur sia kruro, levis lian jupeton, kaj kisis liajn bubajn femurojn kaj grasetajn tibikarnojn.

Ravite sinjoro Lemonier flustris:

—Kiel beleta li estas, kiel beleta!

Kaj sinjoro Reven interbrake premis la infanon, tiklante al li la kolon per siaj lipharoj.

Nur la maljuna servistino Celesta tute ne ŝajnis havi inklinon al la etulo. Ŝi grumblis pri liaj petolaĵoj, kaj koleriĝis pro la dorlotado de ambaŭ viroj.

—Ĉu povas esti, ke infanon oni edukas tiamaniere? — ŝi diris indigne. — El li vi faros belan simion!

Tempo pasis, kaj Johano naŭjariĝis. Li apenaŭ scipovis legi, tiel trodorloita li estis, kaj ĉiam agis nur laŭ sia propra plaĉo. Li sin montris persistega, obstinega, terure kolerema, kaj la patro ĉiam cedis, ĉion konsentis. Sinjoro Reven aĉetis, kaj ĉiumomente alportis ludilojn deziritajn de la knabo, kaj lin nutris per kukoj kaj bombonoj.

Tiam Celesta ekscite deklaris:

—Estas hontindaĵo, sinjoro, hontindaĵo! Vi kaŭzas malfeliĉon al tiu infano, malfeliĉon: ĉu vi aŭdas? Sed necesas, ke tio finiĝu; jes tio finiĝos, mi diras, mi certigas ... kaj post nelonge, jes!

Sinjoro Lemonier respondis kun rideto:

—Kiel mi faru, Celinjo? Lin mi tro amas; kontraŭi mi ne povas. Nur rezignaciu!

Johano ŝajnis malforta, iom malsana. La kuracisto diagnozis anemion, receptis feron, duonkrudan viandon kaj viandsupon.

Sed la etulo frandis nur kukojn, kaj rifuzis ĉian alian nutraĵon: la patro senhelpe plensatigis lin per flanoj kaj ĉokoladtortoj.

Iun vesperon, kiam ili duope altabliĝis, Celesta kun ordonema, mastreca, nekutima mieno alportis supujon. Ŝi senaverte malkovris ĝin, ensupigis mezen kuleron, kaj verdikte decidis:

—Jen supo, kian mi ankoraŭ neniam kuiris al vi; ne pre necesas ĉifoje, ke la etulo manĝu el ĝi.

Sinjoro Lemonier terurite mallevis la kapon. Li antaŭsentis, ke baldaŭ estos katastrofo.

Celesta mem plenigis teleron, kaj metis antaŭ lin. Tuj li sorbetis iom el la buljono, kaj asertis:

—Efektive, ĝi gustas bonege.

Tiam la servistino prenis la teleron de la etulo, enverŝis supon, retiriĝis da paŝojn, kaj atendis.

Johano flaris, kaj naŭze forpuŝis la teleron. Celesta paliĝis, abrupte alproksimiĝis, kaj perforte enŝovis tutplenan kuleron en la duonmalfermitan buŝon de la infano. Li sufokiĝis, tuisis, ternis, kraĉis, kaj kriegante kaptis kaj ĵetis al la servistino sian glason, kiu trafis ŝin rekte sur la mezo de la ventro. Tiam en paroksismo de kolero ŝi ĉirkaŭprenis la kapon de la bubo, kaj senhalte engorĝigis al li kulerplenojn da supo. Ilin li vomis unu post alia, piedfrapis, tordiĝis, baraktis, manbatis la aeron, kun vizaĝo ruĝa kvazaŭ li estus mortonta tuj pro sufokiĝo.

Tiel mirigita estis la patro, ke li komence restis senmova. Subite li sin ĵetis impete kontraŭ la servistinon, ŝin ungepremis ĉe la kolo, kaj forpuŝis al la muro, singultante:

—For de tie ĉi! ... for! ... for! ... brutulino!

Sed ŝi skue liberigis sin, kaj kun hirtaj haroj, kufo surdorsa, ardaĵ okuloj, ekkriis:

—Kio okazas al vi nun? Vi volas min bati, ĉar mi manĝigas supon al tiu infano, kiun vi baldaŭ mortigos per viaj dorlotajoj! ...

Ektremo trakuris lian korpon. Li ripetis:

—Iru for! ... for ... for! ... brutulino ...

Tiam frenezigitte ŝi revenis al li, kaj vizaĝo kontraŭ vizaĝo, tremvoĉe:

—Ha! ... vi opinias, ke vi min traktos tiel! min, min? ... Ha ne! kaj pro kio? ... pro tia bubaĉo, kiu eĉ ne estas via ... Ne ... ne via! ne via! ... ne via! ... Tion ĉiuj scias, kompreneble krom vi! ... Demandu la spiciston, la buĉiston, la paniston, ĉiujn, ĉiujn ...

Ŝi balbutis, sufokita de kolero: poste silentiĝis, kaj lin rigardis.

Li, mortpala, fulmofrapita, ne plu sin movis. Post kelkaj sekundoj li elbuŝigis per stertora voĉo, en kiu tamen tremetis intensa emocio:

—Kion? ... kion? ... vi diras?

Ŝi diris nenion, timigita de lia teruranta vizaĝo. Li pluiris unu paŝon:

—Kion vi diras? ... kion?

Kaj ŝi respondis kvietvoĉe:

—Nu, mi diras, kion mi scias, kompreneble! Kion ĉiuj scias.

Li levis ambaŭ manojn, kaj kiel sovaĝa besto atakis la servistinon, provante faligi ŝin teren. Sed kvankam mal-

juna, ŝi estis fortika kaj lertmova. Ŝi forglitis el liaj brakoj, kaj, denove kolera, rifuĝis post la tablon, blekante:

—Lin rigardu do, rigardu, vi, idioto, ĉu li ne estas la vera portreto de sinjoro Reven? Iom rigardu la nazon ... kaj la okulojn; ĉu liaj okuloj similas viajn? Kaj la haroj? Ĉu ne de sinjoro Reven? Mi diras, kion ĉiuj scias, ĉiuj krom vi! Pri vi la tuta vilaĝo mokridas. Rigardu lin!

Ŝi atingis la pordon, malfermis kaj malaperis. Johano terurite restis senmova antaŭ la suptelero.

Post unu horo ŝi revenis spione, por observi. La etulo tutmanĝinte la kukojn, la pladon da kremo kaj tiun da sukerpiroj, glutis nun la konfitaĵon per sia supkulero. La patro jam estis elirinta.

La infanon Celesta premis, kisis, ŝtele kunportis en sian ĉambron, kaj enlitigis. Senkonsile ŝi revenis en la manĝejon, forigis la manĝilaron, ordigis ĉion.

Nenio bruis en la domo. Ŝi paŝis al la pordo de sinjoro Lemonier, kaj subaŭskultis. Neniu bruo. Ŝi rigardis tra la ŝlosiltruo. Li skribis, kaj ŝajnis trankvila.

Ŝi reiris en la kuirejon, sidiĝis, kaj kun instinkta antaŭsento atendis, ĉu io neordinara okazos. Ŝi ekdormis sur ŝeĝo, kaj vekigis nur ĉe la tagiĝo.

Kiel kutime, ŝi purigis la domon, balais, senpolvigis, kaj ĉirkaŭ la oka preparis la kafon de sia mastro. Sed ŝi ne kuraĝis alporti ĝin al li, ne sciante, kiel ŝi estos akcep-

tata; ŝi do paciencu, ĝis kiam li sonorigos. Li ne sonorigis. Pasis la naŭa ... pasis la deka.

Konfuzita, Celesta pretigis sian pleton, korbate aliris la pordon, haltis, streĉis la orelon. Nenio moviĝis. Ŝi frapis: neniu respondis. Tiam ŝi kurage malfermis, eniris, aŭdigis teruran krion, kaj el ŝiaj manoj terenfalas la matenmanĝo.

Meze en la ĉambro, kolkroĉita al ringo sinjoro Lemo-nier pendis de la plafono. El la buŝo abomene tiriĝis la lango. La dekstra pantoflo kuŝis surplanke, lia maldekstra ankoraŭ vestis la piedon. Renversita seĝo estis rutiliginta ĝis la lito.

Celesta duonfreneze forkuris hurlante. Ĉiuj najbaroj rapidis al la pendanto. Kuracisto konstatis, ke la morto okazis jam noktomeze.

Oni trovis sur la tablo leteron de la sinpendiginto adresitan al sinjoro Reven. Ĝi enhavis nur jenajn vortojn:

—Al vi mi adiaŭas, kaj konfidas la etulon.

Guy de Maupassant

El la franca tradukis Marc Pafo

La kamizolo

Ekzistas homoj, kiuj ŝatas kolekti aĵojn valorajn aŭ malpli valorajn, laŭ siaj eblecoj. Ankaŭ mi havas kolekton, sed modestan kiel estas kutima ĉe la komenco. En ĝi troviĝas dramo skribita de mi dum la latinaj lecionoj, kiam mi estis gimnaziano. Estas en ĝi kelkaj sekaj floroj, kiujn oni devas anstataŭi per freŝaj, estas ... Ŝajnas, ke estas nenio pli ol tre malnova kamizolo. Jen ĝi. Ĝia antaŭa parto estas senkoloriĝinta, la malantaŭa eluzita. Sur la kamizolo estas multaj makuloj, mankas butonoj, troviĝas trueto bruligita certe de cigaredo. Tamen plej interesaj estas ĝiaj kuntiriĝoj. Tiu, kiu havas bukon, estas mallongigita kaj alkudrita ne fake, ne tajlore, dua laŭ sia tuta longeco estas truita per bukaj dentoj. Rigardante la kamizolon oni tuj divenas, ke ĝia posedanto ĉiun tagon maldikiĝis ĝis la momento, kiam la kamizolo estis jam neuzebla, kaj estis necesa vestaĵo el entombiga agentejo. Nun mi volonte donus al iu ĉi tiun vestaĵon, kiu iom ĝenas min. Ŝrankojn por kolektaĵoj mi ne havas kaj inter miaj vestoj mi ne volas teni kamizolon de

malsanulo. Estis iam tempo, kiam mi aĉetis ĝin kontraŭ pli da mono ol ĝia valoro, kaj mi pagus iom pli, se oni pli marĉandus. La homo havas en sia vivo momentojn, kiam li ŝatas havi ĉe si objektojn memorigantajn malĝojon. La malĝojo ne estis mia, nur de miaj najbaroj. Tra mia fenestro mi povis en ĉiu tago observi ilian ĉambreton. En aprilo ili estis triope: sinjoro, sinjorino kaj malgranda servistino, kiu dormis malantaŭ ŝranko sur kofreto. La ŝranko estis intense ĉerizkolora. En julio ili restis jam duope: la sinjorino kaj la sinjoro, ĉar la servistino foriris al gemastroj, kiuj estis pagontaj al ŝi tri rublojn jare kaj kuiris en ĉiu tago tagmanĝon. En oktobro restis nur — la sinjorino sola. Ne tute sola, ĉar en la ĉambro troviĝis mebloj: du litoj, tablo kaj ŝranko. Komence de novembro oni vendis dum aŭkcio ĉiujn nebezonatajn aĵojn kaj el la memoraĵoj post sia edzo la sinjorino lasis nur ĉi tiun kamizolon, kiun nun mi posedas.

Ĉe la fino de novembro la sinjorino vokis al la malplena loĝejo stratan komerciston de brokantaĵoj, vendis al li sian ombrelon kaj la edzan kamizolon kontraŭ 40 groŝoj. Poste ŝi fermis la loĝejon, malrapide trapasis la korton, ĉe la pordo redonis la ŝlosilon al la pordisto, rigardis dum momento sian iaman fenestron, sur kiun falis neĝeretoj, kaj malrapide malaperis malantaŭ la pordo.

Sur la korto restis la strata komercisto. Li starigis la kolumon de sia jako, metis sub la brakon la ĵus aĉetitan

ombrelon kaj envolvante siajn manojn per la kamizolo murmuris:

—Komerco sinjoroj, komerco!

Mi vokis lin.

—Ĉu la sinjoro volas ion vendi? — li demandis enirante.

—Ne, mi volas aĉeti ion de vi.

—Certe la sinjoro volas la ombrelon, respondis la judo, ĵetis la kamizolon planken, forskuis la neĝon de sia kolumo kaj komencis malfermi la ombrelon.

—Fajna meblo — li diris. Por tia neĝo ĝi estas utila. Mi scias, ke vi sinjoro povas havi silkan ombrelon, eĉ du, sed ili estas bonaj nur somere.

—Kiom kostas la kamizolo? — mi demandis.

—Kiu kamizolo? ... li demandis mirigita, pensante certe pri sia propra. Tamen li rapide komprenis kaj levis la kamizolon de la planko.

—Por ĉi tiu kamizolo? ... Ĉu la sinjoro demandas pri ĉi tiu kamizolo?

Poste suspekteme daŭrigis:

—Por kio estas bezonata al estimata sinjoro tia kamizolo?! ...

—Kiom da mono vi volas por ĝi?! ...

Liaj flavaj sklerotoj ekbrilis kaj la pinto de la nazo pli ruĝiĝis.

—Donu, estimata sinjoro, rublon! — li respondis montrante la kamizolon tiel, por vidigi ĝiajn ĉiujn valorojn.

—Mi pagos duonan rublon.

—Duonan? Por tia vestaĵo? Tio ne povas esti — diris la komercisto.

—Eĉ groŝon mi pli ne donos .

—Estimata sinjoro, ne ŝercu! ... li diris frapante mian ŝultron. Vi mem scias, kiom valoras tia aĵo. Ĝi ne estas por malgranda infano, nur por matura persono.

—Nu, se vi ne volas preni duonan rublon, iru! Mi pli ne donos.

—Ne estu kolera sinjoro! Vere mi ne povas vendi ĝin por duona rublo, je mia konscienco, sed mi akceptos vian decidon. Diru mem, kiom ĝi estas valora kaj mi konsentos. Mi preferas malgajni, por ke vi estu kontenta.

—La kamizolo valoras 50 groŝojn kaj mi donos duonan rublon.

—Ĉu duonan rublon? Estu duona rublo! ... li suspiris donante al mi la kamizolon.

—Estu mia perdo! ... Mi ne diris miajn vortojn mensoge. Li montris la fenestron, malantaŭ kiu densiĝis neĝonuboj.

Kiam mi prenis la monon el la poŝo, la komercisto ion ekmemoris, kaptis la kamizolon kaj rapide traserĉis ĝiajn poŝojn.

—Kion vi serĉas?

—Eble mi ion lasis en ĝi, mi ne memoras — li respondis per plej simpla voĉo. Redonante al mi la vestaĵon li aldonis:

—Pagu sinjoro krome dek groŝojn !

—Adiaŭ!

—Mi salutas vin sinjoro. Hejme mi havas tre bonan pelton ...

Ankoraŭ de malantaŭ la pordo li montris sian kapon kaj demandis:

—Ĉu eble la estimata sinjoro ordonos alporti ŝafajn fromaĝojn?

Post kelkaj minutoj li vokis la korto:

—Komerco! Komerco!

Kiam mi ekstaris ĉe la fenestro, li klinis sin kun amika rideto.

Komencis neĝi tiel forte, ke eĉ malheliĝis. Mi metis la kamizolon sur tablon kaj komencis pensi pri la sinjorino, kiu foriris ien, pri la malplena loĝejo de miaj najbaroj kaj pri la posedinto de la kamizolo, sur kiu kreskas pli kaj pli dika neĝa tavolo.

Apenaŭ tri monatojn antaŭe mi aŭdis dum bela septembra tago kiel ili interparolas. En majo la sinjorino eĉ kantetis melodion kaj la sinjoro ridis legante la gazeton "Festa Kuriero", kaj hodiaŭ ...

En mia domo ili ekloĝis komence de aprilo. Ili vekigis frue matene, trinkis teon el lada tekruĉo kaj kune foriris; ŝi por instrui, li al sia oficejo. Li estis modesta oficisto, kiu rigardis siajn ĉefojn kun tiom da admiro, kiel turisto rigardas Tatroj. Li devis multe labori dum la tutaj tagoj. Mi vidis lin eĉ je noktomezo kurbiĝanta ĉe lampo super tableto. Kutime la edzino sidis ĉe li kaj kudris. Ofte rigardante lin, ŝi ĉesis kudri kaj admonis lin:

—Nu, jam sufiĉas, enlitiĝu!

—Kaj vi, kiam vi enlitiĝos?

—Mi nur finos kelkajn stebojn.

—Ankaŭ mi skribos kelkajn frazojn.

Ili ambaŭ klinis la kapojn kaj plu laboris; kaj ree post iom da tempo la sinjorino diris:

—Enlitiĝu! Enlitiĝu!

Ofte respondis al ŝi mia horloĝo sonoranta la unuan horon.

Ili estis homoj junaj, nek belaj, nek malbelaj, trankvilaj. Se mi memoras, la sinjorino estis malpli dika ol la edzo, kies staturo estis fortika. Mi dirus, ke lia silueto estis tro dika por tia modesta oficisto. Ĉiun dimanĉon ili je tagmezo foriris tenante siajn manojn kaj revenis malfrue vespere. Certe ili manĝis en la urbo.

Unu fojon mi renkontis ilin ĉe la pordego inter la botanika ĝardeno kaj la banejoj. Ili aĉetis du kruĉojn da bona akvo kaj du grandegajn mielajn kukojn kaj havis la

trankvilajn mienojn de urbanoj, kiuj kutimas manĝi varmegan ŝinkon kun kreno ĉe teo. Ĝenerale malriĉaj homoj ne bezonas multon por havi animan ekvilibron. Malmulte da manĝaĵo, multe da laboro kaj multe da sano sufiĉas al ili. Ĉio alia aperas mem. Al miaj najbaroj ne mankis manĝaĵo kaj laboro. Tamen sano ne ĉiam estis.

En julio la sinjoro malvarmumis, ne tro. Tamen li havis fortan sangelfluon, pro kiu li perdis la konscion.

Estis jam nokto. La edzino kovris lin en la lito, vokis la pordistinon kaj mem kuris por venigi kuraciston. Ŝi demandis pri kvin kuracistoj, sed trovis nur unu hazarde sur la strato. La kuracisto, vidante ŝin ĉe la flagranta laterna lumo, konstatis, ke antaŭ ĉio oni devas trankviligi ŝin. Momente ŝi ŝanĉeliĝis, certe pro laco, sed sur la strato ne estis droŝko, do la kuracisto donis al ŝi la brakon kaj irante klarigis, ke sangelfluo povas nenion signifigi.

—Sangelfluo povas esti el laringo, stomako, nazo, malofte el pulmoj. Kiam la homo ĉiam estis sana, neniam tuisis ...

—Nur malofte — flustris la sinjorino kaj haltiĝis por suspiri.

—Ĉu malofte? Tio nenion signifas. Li povis esti malsana je nedanĝera bronkito.

—Jes ... estis bronkito — ripetis jam laŭte la sinjorino.

—Ĉu je pneumonio li neniam estis malsana?

—Jes ... li estis — respondis la sinjorino kaj ŝiaj piedoj ŝanceliĝis.

—Jes, sed certe jam antaŭ longa tempo ... — daŭrigis la kuracisto.

—Ho, tre ... antaŭ tre longa tempo ... — ŝi haste konfirmis. — En la pasinta vintro.

—Antaŭ unu jaro kaj duono.

—Ne ... antaŭ la komenco de la nuna jaro ... Jam antaŭ longa tempo!

—Kiel malluma estas ĉi tiu strato kaj la ĉielo estas kovrita per nuboj. — diris la kuracisto.

Ili eniris la domon. La sinjorino demandis time la pordiston, kio okazis kaj eksciis, ke nenio. En la loĝejo ankaŭ la pordistino diris, ke nenio okazis kaj ke la malsanulo dormetas.

La kuracisto delikate vekis lin, ekzamenis kaj ankaŭ diris, ke estas nenio.

—Mi tuj diris mem, ke ĉi tio estas nenio! — konstatis la malsanulo.

—Nenio! ... ripetis la sinjorino premante liajn ŝvitajn manojn. Mi scias, ke hemoragio povas esti el stomako, aŭ el nazo. Ĉe vi estis certe el la nazo. Vi estas dika kaj bezonas moviĝon, sed vi konstante sidas. Ĉu ne vere, sinjoro doktoro, ke li bezonas moviĝon?

—Jes, jes. Moviĝo ĝenerale estas bezonata, sed via edzo devas kuŝi kelkajn tagojn. — Ĉu li povas veturi al vilaĝo?

—Li ne povas — triste flustris la sinjorino.

—Tio ne gravas. Li restos en Varsovio. Mi vizitados lin kaj dume li kuŝu kaj ripozu! Kiam la hemoragio ripetiĝus ... aldonis la kuracisto

—Kion fari? — demandis la edzino paliĝante ĝis vaksa koloro.

—Nu nenion, via edzo ripozos, tie cikatriĝos ...

—Tie en la nazo? — demandis la sinjorino kunmetante la manojn antaŭ la kuracisto.

—Jes, en la nazo. Kompreneble. Estu trankvila! Fidu al la Dia protekto. Bonan nokton!

La vortoj de la kuracisto tiom trakviligis la sinjorinon, ke post la timego sentata dum kelkaj horoj, ŝi gajiĝis.

—Nu, estas nenio grava! ... — ŝi diris ridetante kaj ploretante. Ŝi genuis ĉe la lito de la edzo kaj komencis kisi liajn manojn.

—Ne estas tiel grava — li ripetis mallaŭte kaj ridetis. Kiom da sango elfluas el la homo dum milita batalo kaj poste li estas sana! ...

—Jam neniom parolu! — petis lin la sinjorino.

Ekstere tagiĝis. Somere la noktoj estas tre mallongaj.

La malsano daŭris pli longe ol oni pensis. La edzo ne plu laboris en sia oficejo. Ne estis pro tio problemo, ĉar

kiel neetata oficisto li ne bezonis ripoztempon kaj povis reveni kiam li volus kaj se estus libera loko. Estante en la hejmo li sentis sin pli sana, do la edzino instruis dum pli da horoj por pagi la hejmajn elspezojn. Kutime ŝi foriris je la oka matene. Je la dektria ŝi revenis por kelkaj horoj, kuiris tagmanĝon por la edzo kaj ree foriris.

Dum la vesperoj ili estis kune. La sinjorino, por ne mallabori, prenis hejmen fremdajn aĵojn kaj kudris ilin. Fine de aŭgusto ŝi renkontis sur la strato la kuraciston. Ili iris longe kune. Ŝi subite kaptis lian manon kaj petegis:

—Venu al ni! Eble Dio permesos ... Li tiel trankviliĝas post ĉiu via vizito ...

La kuracisto promesis kaj la sinjorino revenis hejmen aspektante, kvazaŭ ŝi plorus. La edzo pro senlaboreco iĝis iritiĝema kaj malesperanta. Li riproĉis al la edzino, ke ŝi estas tro zorgema, sed malgraŭ tio li estas mortonta kaj demandis:

—Ĉu la kuracisto ne diris al vi, ke mi ne vivos eĉ kelkajn monatojn?

Sinjorino rigidiĝis.

—Kion vi diras? De kie tiaj pensoj?

La malsanulo koleriĝis.

—Venu al mi! Jen ĉi tien! ... li diris, pasie tenante ŝiajn manojn. — Rigardu rekte en miajn okulojn kaj respondu! Ĉu ne diris tion al vi la kuracisto?

Li rigardis ŝin per febre brilantaj okuloj. Ŝajnis, ke pro ĉi tiu rigardo eĉ muro flustrus sekreton, se ĝi posedus iun.

Sur la virina vizaĝo aperis stranga trankvilo. Ŝi ridetis milde, eltenante lian sovaĝan rigardon. Nur ŝiaj okuloj iĝis kvazaŭ vitrecaj.

—La kuracisto diris — ŝi respondis — ke ĉi tio estas nenio grava, vi nur devas ripozi ...

La edzo subite lasis ŝin, ekstremis, ridis kaj svingante per la mano diris:

—Nu vidu, kiel ekscitiĝema mi estas! Mi pensis, ke la kuracisto perdis la esperon pri mi ... sed ... vi konvinkis min ... Mi jam estas trankvila.

Li pli gaje ridis pro siaj suspektoj.

Tia atako de suspektemo neniam plu ripetiĝis. La milda edzina trankvilo estis la plej bona pruvo, ke lia stato ne estas malbona. Kial ĝi estu malbona? Estis tuso, sed pro bronkito. Malofte pro longa sidado aperis sango — el la nazo. Li havis febron, sed ĝi ne estis febro, nur nervozeco. Ĝenerale li sentis sin sana. Li deziris ekskursi, sed iom mankis al li la fortoj. Venis la tempo, kiam la edzo ne volis kuŝi en lito, nur sidis sur la seĝo vestita, preta por foriri, kiam nur forlasos lin tiu ĉi momenta malforteco. Maltrankviligis lin nur unu detalo. Iun tagon, vestante la kamizolon li rimarkis, ke ĝi estas iom tro vasta.

—Ĉu mi povus tiom maldikiĝi? ... — li flustris.

—Kompreneble, ke vi iom maldikiĝis — respondis la edzino — sed oni ne povas troigi ...

La edzo atente rigardis ŝin, kiu eĉ ne levis okulojn de la kudraĵo. Ne, ŝia trankvilo ne povas esti ŝajna. La edzino scias de la kuracisto, ke li ne estas tro malsana, do ŝi ne devas ĉagreniĝi.

En septembro la nervaj febraj statoj okazis pli forte kaj daŭris tutajn tagojn.

—Tio estas malgrava — diris la malsanulo. Inter somero kaj aŭtuno eĉ la plej sana homo estas iritema, ĉiu sentas sin alie ... Nur mirigas min, kial mia kamizolo estas pli kaj pli vasta? ... Mi devis tre maldikiĝi kaj mi ne povos esti sana ĝis mi reakiros mian antaŭan korpopezon.

La edzino atente aŭskultis kaj devis konsenti kun la trafa pensado de la edzo. La malsanulo en ĉiu tago ellitiĝis, vestis sin, sed sen la edzina helpo ne povis surmeti la vestaĵon. Tiam ŝi atingis, ke li ne prenu la surtuton, sed nur la mantelon.

—Kial ne miriĝi — li ripetadis rigardante sin en spegulo — kial ne miriĝi, pri mia malforteco. Kiel mi aspektas!

—Nu, la vizaĝo facile ŝanĝiĝas — ŝi interrompis.

—Jes, vere, sed mi tuta maldikiĝas.

—Ĉu ŝajnas al vi? — demandis la sinjorino kiun forta akcento de dubo.

Li meditis: Ha! Eble vi diras la veron ... ĉar eĉ ... de kelkaj tagoj mi konstatas, ke ... mia kamizolo ...

—Ne diru! — rompis la sinjorino — ja vi ne dikiĝis ...

—Kiu scias ... ĉar observante la kamizolon ...

—Do viaj fortoj devus reveni.

—Ho! Vi volus tuj ... Unue mi devas iom dikiĝi. Eĉ kiam mi rekiros mian pezon, ne tuj mi rekiros la fortojn. Kion vi faras malantaŭ la ŝranko?

—Nenion, mi serĉas lavtukon en kofro.

—Ne streĉu vin tiom, ĉar eĉ via voĉo ŝanĝiĝas ... Ja la kofro estas peza ...

Fakte la kofro devis esti peza, ĉar la vizaĝo de la edzino ruĝiĝis, sed ŝi estis trankvila. De tiu tempo la malsanulo atente observis sian kamizolon. Post kelkaj tagoj li vokis la edzinon kaj diris:

—Nu, rigardu! Rigardu mem! Hieraŭ mi ankoraŭ povis meti la fingron ĉi tien, ĉi tien ... Hodiaŭ mi ne plu povas. Mi vere dikiĝas! ...

Iun tagon la ĝojo de la malsanulo estis grandega. Kiam la edzino revenis, li salutis ŝin kun brilantaj okuloj kaj diris kortuŝita:

—Aŭskultu! Mi diros al vi sekreton ... Mi iom trompis vin pri la kamizolo. Por trankviligi vin en ĉiu tago mi mem kuntiris la zonon kaj pro tio ĝi estis malvasta. Tiel mi altiris ĝin ĝis la fino. Mi ĉagreniĝis pensante, ke la sekreto malkaŝiĝos, sed subite, hodiaŭ ... Hodiaŭ, mi ĵuras,

anstataŭ kuntiri la zonon, mi devis ĝin iom malstreĉi. Nu, nun ankaŭ mi kredas, ke mi estos sana ... Mi mem! ... La kuracisto pensu, kion li volas ...

La longa parolo tiom elĉerpis lin, ke li devis iri al la lito. Tie tamen, kiel homo, kiu sen kuntirado de la zono dikiĝas, li ne kuŝis, nur apogata je la edzino sidis kiel en fotelo.

—Nu, nu! ... — li flustris — kiu supozus? ... Du semajnoj mi trompis mian edzinon pri la malvasta kamizolo, kaj hodiaŭ ĝi vere estas tia! ... Nu ... nu!

Ili sidis tenante sin reciproke la tutan vesperon. La malsanulo estis kortuŝita kiel neniam antaŭe ...

—Mia Dio! — li flustris kisante ŝiajn manojn — mi pensis, ke mi maldikiĝados ĝis ... la vivofino. De du semajnoj mi kredis pri la ebleco de resaniĝo. Ĉe malsanulo ĉiuj mensogas, kaj edzino plej. Sed la kamizolo — ĝi ja ne mensogas! ...

Poste rido ŝanĝiĝis en gajan interparolon, multajn fojojn oni ripetis: "Bonan nokton!" kaj ĉio silentiĝis.

Hodiaŭ, rigardante la malnovan kamizolon mi vidas, ke ĉe ĝiaj kuntiriloj laboris du personoj. La sinjoro en ĉiu tago ŝovadis la bukon por trankviligi sian edzinon, kaj la sinjorino mallongigadis la zonon, por aldoni al la edzo kuraĝon.

—Ĉu iam ili renkontiĝos por rakonti al si reciproke la sekreton pri la kamizolo? — mi pensis rigardante la ĉielon. La ĉielo preskaŭ ne estis supre. Falis nur la neĝo tiel densa kaj malvarma, ke eĉ en la tombejoj frostiĝis la homaj polvoj. Kiu tamen diros, ke super ĉi tiuj nuboj ne estas suno?

Vekita birdo pli forte kaptis branĉeton kaj ree ekdormis. Ĝi songis en la kapeto kaŝita subflugilo, ke ĝi estas kiel iam malgranda birdeto kaj dormas en la nesto ĉe la varmega patrina sino.

Boleslaw Prus (1847—1912)

El la pola tradukis Danuta Kowalska

La notario de Périgueux

Vi devas scii, sinjoroj, ke antaŭ kelkaj jaroj, en la urbo Périgueux, vivis honesta publika notario, devenulo de tre antikva kaj kaduka familio, kaj enloĝanto de unu el tiuj malnovaj, vetertuŝitaj domoj, kiuj memorigas vin pri la epoko de via praavo. Li estis viro de neofenda, trankvila temperamento; patro de familio, kvankam ne estro — ĉar en tiu familio "la kokino superkriis la kokon" — kaj la najbaroj, parolante pri la notario, kutimis levi la ŝultrojn kaj ekkriis: "Kompatindulo! Liaj spronoj bezonas akrigon." Unuvorte — vi komprenas, sinjoroj — li estis edzinturmentita.

Nu, ne trovante pacon hejme, li tute nature ĝin serĉis aliloke; kaj fine trovis ripozejon tute for de la zorgoj kaj bruoj de la hejma vivo. Tio estis malgranda trinkejo, iom for ekster la urbo, kien li iradis ĉiuvespere por fumi pipon, trinki sukerakvon, kaj ludi sian plej ŝatatan domenludon. Tie li renkontis siajn plej amatajn intimulojn; aŭdis ĉiujn klaĉaĵojn de la tago; ridis, kiam li estis gajhumora; trovis konsolon, kiam li estis malgaja; kaj ĉiam

aerumis la opiniojn, ne timante, ke oni lin repuŝos per absoluta kontraŭdiro.

Nu, la plejintimulo de la notario estis komercisto de bordoza vino kaj konjako, kiu loĝis ĉirkaŭ tri mejlojn ekster la urbo, kaj ĉiam pasigis la vesperojn en la trinkejo. Li estis maldelikata korpulentulo, deveninta de plensanga gaskona raso, kaj naskigita de komedianto iom bonfama siaspece. Li estis rimarkinda pro nenio krom sia bonhumoro, amo al kartludoj, kaj forta inklino provi la kvaliton de siaj propraj alkoholaĵoj kompare kun tiuj aliloke vendataj.

Ĉar malbonaj kunuloj malvirtigas bonajn morojn, la malbonaj kutimoj de la vinvendisto nesentebly allogis la bravan notarion; kaj antaŭ ol li mem konsciis pri tio, li sin trovis delogita for de la domenludo kaj sukerakvo, kaj aldonita al pikedo kaj spicita vino. Efektive, ne malofte okazis, ke post longa kunsido en la trinkejo, la du amikoj fariĝis tiel afablaj, ke ili konsumadis tutan duonhoron ĉeporde, amike disputante, kiu el la du hejmen kondukos la alian.

Kvankam tiu vivmaniero bone taŭgis al la malvigla, flegma temperamento de la vinvendisto, ĝi baldaŭ komencis difektegi la pli impresiĝeman konstitucion de la notario, kaj fine tute malagordigis lian nervsistemon. Li perdis apetiton, fariĝis maldikega kaj marasma, kaj ne povis dormi. Tage aroj da "melankoli-koboldoj" lin ob-

sedis, kaj nokte strangaj vizaĝoj rigardis tra la litkurtenoj, kaj inkuba monstro spirblovis en lian orelon. Ju pli malbone fariĝis al li, des pli li fumadis kaj trinketadis; kaj ju pli li fumadis kaj trinketadis, nu, kompreneble, des pli malbone fariĝis. La edzino alterne furiozis, protestis, petegis; sed tute vane. Ŝi igis la hejmon netolerebla — li sin retiris al la trinkejo; ŝi frakasis liajn longtubajn pipojn kontraŭ la kamenajn stabletojn — li anstataŭigis ilin per mallongtuba pipo, kiun li portis, preter danĝero, en la veŝtpoŝo.

Tiel, iom post iom, fariĝis malbonege al la malfeliĉa notario. Pro kombinaĵo de malbonaj kutimoj kaj hejmaj plendaĵoj li tute malesperiĝis. Li imagis, ke li estas mortonta, kaj suferis rapidvice ĉiujn malsanojn, kiuj iam atakis mortemulon. Ĉiu pikdoloro estis timiga simptomo — ĉiu sento de maltrankvilo post manĝo nepre antaŭdiro pri mortiga malsano. Vane liaj amikoj penis lin delogi de liaj strangaj kapricetoj, per rezonado kaj poste per ŝermokado; ĉar ĉu iam ŝerco aŭ rezonado resanigis malsanan imagon? Lia sola respondo estis: ”Ja lasu min trankvila; mi scias pli bone ol vi, kio estas al mi.”

Nu, sinjoroj, jen kiel estis la afero, kiam iun posttagmezon en decembro, dum li sidis malgaja en la oficejo, ĉirkaŭvolvita de supervesto, kun ĉapo sur la kapo kaj kun piedoj puŝitaj en paron de peltgarnitaj pantofloj, kabrioleteto haltis ĉe la pordo, kaj laŭta frapado vekis lin

el lia malgaja revo. Estis komunikaĵo de lia amiko, la vinvendisto, kiu, subite atakita de forta febro, kaj pli kaj pli malsaniĝanta, nun venigis la notarion kiel eble plej rapide por redakti sian finan testamenton. La kazo urĝis, kaj permesis nek forreston nek prokraston, kaj la notario, vindinte tuketon ĉirkaŭ la vizaĝon kaj butonuminte la superveston ĝis la mentono, ensaltis la kabrioleton kaj permesis, kvankam ne sen malgajaj antaŭsentoj kaj duboj, ke oni veturigu lin al la domo de la vinvendisto.

Alveninte, li trovis ĉion ege malordigita. Enirante la domon li koliziis kun la apotekisto, kiu malsupreniris la ŝtuparon kun vizaĝo longa kiel via brako; kaj post kelkaj pluaj paŝoj li renkontis la mastrumantinon — ĉar la vinvendisto estis maljuna fraŭlo — kuranta tien kaj reen, kaj tordanta la manojn pro timo, ke la bonulo mortos ne testamentinte. Li baldaŭ atingis la ĉambron de sia malsana amiko kaj trovis lin ruliĝanta en febra paroksismo kaj laŭte petanta trinkon da malvarma akvo. La notario skuis la kapon; li opiniis, ke tio estas malesperiga simptomo; de antaŭ dek jaroj la vinvendisto suferis pro speco de hidrofobio, kiu ŝajne subite forlasis lin.

Kiam la malsanulo vidis, kiu staras apud la lito, li etendis la manon kaj ekkriis:

”Ho! mia kara amiko! Ĉu vi fine venis? Vi vidas, ke al mi ĉio estas finita. Vi alvenis ĝustatempe por redakti tiun — tiun mian pasporton. Ho, je la diablo, kiel varme-

ge estas ĉi tie! Akvon — akvon — akvon! Ĉu neniu donos al mi guteton da malvarma akvo?”

Ĉar la afero urĝis, la notario ne prokrastis la pretigon de siaj dokumentoj; post mallonga tempo la fina testamento de la vinvendisto estis redaktita laŭ ĝusta formo, kaj la notario gvidis la manon de la malsanulo, dum li metis sian subskribon ĉe la fino.

Dum la vespero konsumiĝis, la vinvendisto fartis pli kaj pli malbone, kaj fine deliris, intermiksante en siaj malklaraj deliraĵoj la frazojn el la Kredo kaj Patronia kun la ŝiboletoj de la trinkejo kaj la karttablo.

”Zorgu, zorgu! Nu, do — *Credo in* — pop! glu-glu-glu! donu al mi iom da tio. Cent dek! Jen, vi fripono, la vino estas venenita — mi konas viajn ruzojn! — *Sanctam Ecclesiam Catholicam* — Nu, nu, ni vidos. Idioto! havi la grandan trisekvon kaj la sep’ de l’ keroj, kaj ne uzi la sep’! Je Sankta Antonio, la fino! Vi estas plenvenkita — ha, ha, mi tion atendis! Mi bone sciis — nu — nu — ne min interrompu — *Carnis resurrectionem et vitam eternam!*”

Kun tiuj vortoj sur la lipoj la kompatinda vinvendisto mortis. Dume, la notario kaŭrsidis ĉe la fajro, konsternita pro la terura sceno okazanta antaŭ liaj okuloj, kaj de tempo al tempo penante elteni la kuraĝon per glaseto da konjako. Liaj timoj jam estis viglaj, kaj la ideo pri kontaĝo flugetis tra lia menso. Por trankviligi tiujn malbon-

signajn pensojn, li ekbruligis la pipon, kaj komencis sin prepari por la hejmeniro. Tiumomente la apotekisto sin turnis al li, kaj diris :

”Jen terure malsaneca tempo! Ŝajnas, ke la malsano plivastiĝas.”

”Kiu malsano?” ekkriis la notario, kun ekmoŭo de surprizo.

”Du mortis hieraŭ, kaj tri hodiaŭ,” daŭrigis la apotekisto, ne respondante la demandon. ”Tre malsaneca tempo, sinjoro — tre.”

”Sed kiu malsano ĝi estas? Kiu malsano forportis mian amikon ĉi tie tiel subite?”

”Kiu malsano? Nu, skarlatino, kompreneble.”

”Kaj ĉu ĝi estas kontaĝa?”

”Sendube.”

”Do mi estas mortonto!” ekkriis la notario, enmetante sian pipon en la veŝtupoŝon kaj senespere ekmarŝante tien kaj reen tra la ĉambro.

”Mi estas mortonto! Nu, ne trompu min — promesu! Kiaj — kiaj estas la simptomoj?”

”Akra bruldoloro ĉe la dekstra flanko,” diris la apotekisto.

”Ho, kia malsaĝulo mi estis, veni ĉi tien!”

Vane la mastrumantino kaj la apotekisto penis lin trankviligi — li ne estis alirebla per rezono; li respondis, ke li konas sian staton pli bone ol ili, kaj insistis iri hej-

men senprokraste. Bedaŭrinde la veturilo, en kiu li venis, jam reiris al la urbo, kaj ĉiuj najbaroj enlitiĝis kaj dormis. Kion fari? Nenio farebla, krom uzi la ĉevalon de la apotekisto, jam staranta alligite ĉe la pordo, pacience atendanta, kion volos ĝia mastro.

Nu, sinjoroj, ĉar ekzistis neniu alia rimedo, nia notario suriĝis sur tiun ostomontran ĉevalon, kaj ekiris hejmen. La nokto estis malvarma kaj blova, kaj la vento rekte kontraŭa. Supre la plumbokoloraj nuboj tien kaj reen flugis, kaj tra ili la ĵus leviĝinta luno ŝajnis ruliĝi kaj peliĝi kiel boateto en ondoŝaŭmo; jen englutita de nuba ondego, jen levita sur ĝia sino kaj ŝprucigita de arĝenta aspergaĵo. La arboj apud la vojo ĝemis per malbonaŭgura sono, kaj antaŭ li restis tri longaj mejlaĉoj, ŝarĝitaj de mil imagaj danĝeroj. Obea al vipo kaj spronoj, la ĉevalo spasme saltis antaŭen, foje kuregante en galopego, foje moderiĝante ĝis longa, rapida troto; dum la rajdanto, pensplena pri simptomoj de malsano kaj teruraj antaŭsentoj de morto, ĝin incitis kvazaŭ li forkurus antaŭ pesto.

Tiamaniere, pere de fajfado kaj kriegado, kaj batado dekstren kaj maldekstren, unu mejlo de la fatala trio pasis sen difekto. La antaŭtimoj de la notario moderiĝis ĝis tio, ke li eĉ permesis al la kompatinda ĉevalo suprenmarŝi deklivon; sed tiuj antaŭtimoj subite reviviĝis dek-

oble pli fortaj, pro akra dekstraflanka doloro, kiu ŝajnis lin trapiki kiel kudrilo.

”Jen mi ĝin havas, fine!” ĝemis la timfrapita viro. ”Ĉielo kompatu min, la plej grandan el pekuloj! Kaj ĉu mi devas morti en fosaĵo, post ĉio? He, rapidu, rapidu!”

Kaj for flugis ĉevalo kaj rajdanto plengalope — agitarapidege — supren kaj malsupren — spasmospirante, spirblovante, kvazaŭ kirlovento. Je ĉiu salto la doloro ĉe la flanko de la rajdanto ŝajnis plifortiĝi. Unue ĝi estis nur punkteto simila al piko de kudrilo — poste ĝi pligrandiĝis ĝis amplekso de duonfranka monero — poste ĝi etendiĝis sur spacon tiel grandan kiel via manplato. Ĝi rapide plifortiĝis. La kompatindulo laŭte ĝemis pro dolorego; pli kaj pli rapide kuregis la ĉevalo trans la frostitan teron — pluen kaj pluen etendiĝis la doloro trans lian flankon.

Por kompletigi la malgajigan bildon, ŝtormo komenciĝis — neĝo miksita kun pluvo. Sed neĝo kaj pluvo kaj malvarmo tute ne gravis al li; ĉar kvankam la brakoj kaj kruroj frostiĝis en glacipendaĵojn, li ne sentis tion, la mortsimptomo lin trafis; li estis kondamnita morti — ne pro malvarmo, sed pro skarlatino!

Fine, li ne sciis kiel, mortinta pli ol viva, li atingis la pordegon de la urbo. Bando da hundaĉoj, kiuj serenadis ĉe stratangulo, vidante la notarion preteriregi, komencis lin persekuti kaj kuris apude, bojante kaj jelpante.

Nun estis tre nokta horo, kaj nur tie kaj alie izola lampo trembrilis el supra etaĝo. Sed ĉiam pluen iris la notario, zigzage laŭ la stratoj, ĝis fine li atingis sian pordon. Estis lumo en la dormoĉambro de la edzino. La bonulino venis al la fenestro, timigita pro tia frapado, kriaĉado kaj ĉeporda klakado je tia malfrua horo; kaj la notario tro plene absorbiĝis en siaj propraj ĉagrenoj por rimarki, ke la lamplumo ĵetis la ombrojn de du kapoj sur la fenestran kurtenon.

”Enlasu min! enlasu min! Rapidu, rapidu!” li ekkriis, preskaŭ senspira pro teruro kaj laceco.

”Kiu estas vi, kiu venas ĝeni izolatan virinon en tia nokta horo?” kriis akra voĉo de supre. ”Foriru, atentu viajn aferojn, kaj lasu kvietulojn dormi.”

”Ho, diablo, diablo! Malsupreniru kaj enlasu min! Mi estas via edzo. Ĉu vi ne konas mian voĉon? Rapidu, mi petegas, ĉar mi mortas ĉi tie sur la strato!”

Post kelkmomenta prokrasto kaj kelkaj pluaj argumentaj paroloj, la pordo malfermiĝis, kaj la notario paŝegis en sian domon, pala kaj marasma laŭ aspekto, kaj rigida kaj rekta kiel fantomo. Tegita kapal piede de glacio, sub la brilega lamplumo li aspektis kvazaŭ vagkavaliro en ŝtala kiraso. Sed en unu punkto la kiraso estis difektita. Ĉe la dekstra flanko troviĝis ronda makulo granda kiel verto de ĉapelo, kaj preskaŭ same nigra!

”Kara edzino mia! ”li ekkriis kun pli da dolĉeco ol li elmontris dum multaj jaroj, ”pasigu seĝon. Miaj horoj estas kalkulitaj. Mi estas mortonto!”

Timigita pro tiuj ekdiroj, la edzino forigis lian superveston. De sub ĝi io falis, kaj frakasiĝis sur la kamenon. Estis la pipo de la notario. Li almetis manon al sia flanko, kaj jen! ĝi estis senvesta ĝis la haŭto. Vesto, veŝto kaj tolaĵo plene trabruliĝis, kaj ĉe lia flanko estis haŭtveziĝo grandmezura kiel via kapo!

La mistero baldaŭ klariĝis, ankaŭ la simptomo. La notario estis enpoŝiginta la pipon, ne foriginte la cindrojn! Kaj tiel finiĝas mia rakonto.

H. W. Longfellow

El la angla tradukis G. M. Hayton

Via momento sur la tero

Ĉe la bordo de la Pacifika oceano mi havas mian hejmon. La plej granda el la maroj de la mondo muĝas ekstere ĉe la angulo de mia domo. Ĉambro numero 20 en Hotelo Eden sur Cleo Street en Laguna Beach estas mia hejmo sur la tero.

Mi loĝas inter la urbo kaj la maro. Mia hotelĉambro havas du fenestrojn. Tra la orienta fenestro, kiu rigardas al la strato, mi vidas la senfinan vicon da moviĝantaj aŭtomobiloj, tra la dua fenestro antaŭ mi la volbiĝantaj ondojn de la oceano. Trafikbruo kaj marmuĝo — — — sonoj de la strato el oriento kaj de la akvo en okcidento unuiĝas en miaj oreloj. La aŭtomobiloj sur la strato aŭdiĝas kiel grandega radŝpinilo, kiu neniam haltas, dum la muĝo de la maro altiĝas kaj malaltiĝas laŭ la movoj de la ondoj, kiel elspiro el la profundo de la pulmoj de la mondo. La aŭtomotoroj bruegas, krakas kaj brutintas, la ondoj el la profundo disrompiĝas sin frapegante kontraŭ la rokoj de la marbordo kun sonego kiel kanonpafado,

la akvo ŝpruciĝas alten kaj duŝas la branĉaron de la cipresoj. Tage regas la sono de la urbo, nokte superas tion la muĝo de la maro. Tage la bruo de la motoroj plenigas miajn orelojn, nokte regas la oceano sola.

La sono de la strato estas same juna kiel la strato mem, la bruo de la maro estas samaĝa kun la elementoj. La motorsonoj de la urbo iam silentiĝos kaj la rado de la radŝpinilo haltiĝos, sed la maro daŭros ĵetegi siajn ondojn kontraŭ la bordon. Iam nur la maro estos la sola, tagnokta, suverena reganto.

Mi estas gasto en hotelo situanta inter la strato kaj la oceano. Mi loĝas inter homkreaĵo kaj praelemento, registrita ekde mia naskiĝo kiel hazarda aperaĵo sur tiu ĉi tero. Inter la efemero kaj la senfino mi havas mian hejmon.

En la hazarda esteco mi estas unu el la loĝantoj en la urbeto Laguna Beach en suda Kalifornio, unu enmigrinto inter amaso da enmigrintoj el Eŭropo. Ĉi tie ĉe la okcidenta bordo de la Ŝtatoj la vetero estas taŭge milda, la suno taŭge forta, la vento taŭge freŝa, la marakvo taŭge varma. Ĉi tie kreskas oranĝarboj, ĉi tie maturiĝas delikataj fruktoj. Tiu ĉi ŝtato estas la lasta koloniista ŝtato en Usono. En nia ŝtato ekloĝas ĉiun tagon el la 365 tagoj de la jaro meznombre 1700 homoj. La taga enmigrantaro estas tiel multnombra, ke ili povas krei ankoraŭ

novan socion, ĉi tie oni povas fondi ĉiutage unu novan urbon. Ĉe nia marbordo multaj junaj homoj altiriĝas al malnovaj primitivaj ĝojfontoj, suno kaj maro, kaj ĉi tie ili komencas novan ekziston.

Ĉi tie la vivo sentiĝas juna por la gejunuloj. Por mi, mr. Albert Carlson, malnova enmigrinto, estas alie. Mi estas en tiu aĝo, kiam la kapablo por renoviĝo finiĝis. Venis la tagoj, kiam mi ne plu travivas ion, kion mi konsideras travivinda.

Dum periodo de mia vivo mi havis plurajn loĝejojn. Mi loĝis en domoj ekipitaj kaj instalitaj kun ĉiuj tiuj meĥanikaj aĵoj, kiujn la homo eltrovis por altigi sian komforton kaj bonfarton sur tiu ĉi tero. Mi havis spacajn domoj, sed en neniu el ili mi sentis min hejme. Mi ne loĝis longe en iu el ili. Mi estas posedinta plurajn loĝejoj, sed neniun hejmon.

Ĉi tie en mia hotelĉambro kun numero 20 sur la por-do, mi volas resti ĝis mi povos. Antaŭ nelonge mi skribis al mia pli aĝa filo, kiu havas mian baptonomon Albert: "Ĉi tie en Laguna Beach mi intencas resti kaj loĝi en tiu ĉi hotelo dum mia restanta vivo, se mi havos rimedojn por tio. Mi volas sidi ĉi tie ĉe mia fenestro kaj rigardi eksteren al la oceano kaj pensi pri la okazintaĵoj, kiujn mi travivis."

Estonte mi volas esti lokfiksita estaĵo. Plejparton de miaj lastaj jaroj mi uzis por vojaĝoj. La intenco de iu vo-

jaĝo estas atingi iun fiksitajn celojn, kiun oni povas trovi en geografio. Sed por miaj vojaĝoj ne ekzistis iu celo sur la tero. El la vidpunkto de rezulto tiuj vojaĝoj havis neniun sencon, ĉar ili donis al mi neniun rezulton. Mi serĉis ion, kion mi estis devigata serĉi, sed la celo ekzistis en la vojaĝanto mem kaj ne estis trovebla ie alie. Mi serĉis ŝirmilon kontraŭ mia konscio. Mia konscio tenis min moviĝanta, pelis min kaj devigis min al novaj ekvojaĝoj. La vojaĝoj efikis je mi kiel narkotiko efikas kontraŭ doloro: ili kvietigis la simptomojn, sed povis fari nenion kontraŭ la kaŭzo.

Kaj kiomfoje mi translokiĝis kaj ŝanĝis loĝejon en mia vivo! Sed translokigo de mia korpo sur la tero solvas neniun problemon al mi.

Tiamaniere mi daŭras esti rifuĝinto, kaj mia pelanto estas la scio, kontraŭ kiu mi batalas, la kompreno, kiun mi ne povas elteni. Ĝi trovas min tage, ĝi venas al mi nokte, ĝi volas resti ĉe mi vespere antaŭ ol mi ekdormas, ĝi aperas ĉe mi matene tuj post mia vekigo. Estas la kompreno, ke mia vivo pasis. Tiu vivo, por kiu valoris vivi, estas por mi pasinta. Kaj de tiu kompreno estas nedisigebla la demando: Kiel mi uzis ĝin?

Fine mi fariĝis soleca homo en hotelĉambro. Eble mi estus daŭriginta miajn vojaĝojn, se mia ekonomia stato ne estus ŝanĝita. Nun mi ne plu havas rimedojn por ili.

Sed mi sentas min pli hejmece ĉi tie en mia ĉambro en hotelo Eden ol en tiuj grandaj, komfortaj domoj, kie mi antaŭe loĝis. Ju malpli granda estas mia hejmo, des pli mi konas ĝiajn kaŝejojn. Kun la amplekso kvadratmetra de iu loĝejo kreskas la soleco de ĝia loĝanto.

Kaj en tiu ĉi ekzistado, kiun mi nun kondutas, ŝajnas ke la donaco de vivo estas elĉerpita. Kio restas, ne ŝajnas al mi grava. La tagoj, monatoj aŭ jaroj, kiuj restas ankoraŭ por vivi, nenion povas ŝangi, aŭ redoni perditajn ŝancojn kaj neuzitajn eblecojn, ne kapablas helpi min ricevi ion, kion mi dezirus.

Ŝajnas, ke mi pluvivas mian vivon sur treege mallarĝa terstrio, kien iu senfina maro fluigis min, kaj tie mi kun grandega penado alkroĉiĝis, atendente la solan, kio povas okazi al mi: ke la sama maro, kiu alportis min ĉi tien, reprenos min denove, kaj forfluigos min de mia eta terstrio kaj en sia profundo donos al mi dormon senfinan.

Nokte, kiam la konscio pri tio ĉi penetras en min, mi kuŝas kaj aŭskultas la movojn de la Pacifika oceano kontraŭ la strando sub la hotela teraso. Mi forfuĝas de mia persekutanto, en miajn hotelsentojn. Per la oreloj mi sekvas la fluon de la ondoj, kiuj per grandega forto ĵetas sin kontraŭ la granitan rokdigon kaj rompiĝas sur ĝi. Mi aŭskultas la kanonadon de la oceano kontraŭ la strandomuron. La ondo retiriĝas, sed nova venas. La maro re-

ŝargas sian kanonon, pafas obtuze kaj la ondo rompiĝas kontraŭ la rifoj, kiuj rekovriĝas de la marakvo, kiel de forta pluvego. Mi aŭdas fali la pezajn gutegojn.

La bruo kaj murmurado de la marstrando plenigas miajn orelojn. Sed ili ne sukcesas forpeli mian persekutanton. La demandoj de miaj pensoj ree ripetiĝas. Sed ne ekzistas respondoj al ili — — — ili nur rompiĝas kontraŭ granita muro. Ili reĵetiĝas, forfluiĝas. Sed ili revenas, ree kaj ree, kiel la ondoj de la akvolarĝo.

Jen ĝi re estas, la konscio, ke mia vivo pasis. Kio restas al mi? Kio atendas min? Mi trovas nur unu respondon: rezigni kaj atendi la ondon, kiu reportos min.

*

Cleo Street, mia hejmsrato, estas la ĉefstrato en Laguna Beach kaj samtempe la ĉefvojo, kiu streĉas sin en la direkto nordo-sudo laŭ la marbordo de Kalifornio. Laŭlonge de tiu vojo ekkreskis domoj, kiuj kreskis ĝis urbo. En kelkaj jaroj duobligis la loĝantaro de Laguna Beach. La fumegado de la naftofontoj malpurigas la aeron super la grandurbo Los Angeles, sed la ventoj de la maro tenas la aeron pura kaj freŝa por ni ĉi tie en la malgranda Laguna. Nin ankaŭ ne trafas la varmego, kiu regas pli interne en la lando malantaŭ la montoj.

Ne pluvis ĉi tie de aprilo ĉi jare, 1962, kaj ni jam atingis la finon de julio. Ne pluvos antaŭ novembro. Mi vi-

das de mia fenestro la altajn montojn, kie la suno forbruligis la vegetaĵaron. La herboj staras sekaj kaj velkaj kaj brutintetas dezerte pro la ventopuŝoj. La montaj deklivoj brilas ruĝbrunaj, kaj ŝajnas al mi, kvazaŭ ili odoras bruldifektite, kiel forgesita rostaĵo en forno. Nur la dornaj arbustoj de grandegaj kaktoj, la sola kontraŭstaranta vegetaĵaro, brilas kiel verdaj ŝprucmakuloj.

Bruldifektitaj de la suno levas la montoj siajn dorsojn, similaj al grandegaj ŝtonigitaj pralacertoj, kiuj gardas la urbon sub si.

Laguna — kiel nia urbo nomiĝas en ĉiutaga parolo — havas tre favoran situon inter la maro kaj la montoj. La maro freŝigas la aeron, kiun ni enspiras, la montoj ŝirmas nin kontraŭ la dezertaj ventoj. La maro estas en konstanta movo, la montoj en eterna senmovo.

Mi estas ĵus reveninta el vojaĝo al tiu loko sur la tero, kie mi naskiĝis. Antaŭ nur semajno mi troviĝis sur la alia flanko de la terglobo. Antaŭ unu semajno mi sidis en alia hotelĉambro. Estis hotelo situanta en uzina regiono en la sveda provinco Smolando, kaj la ĉambro estis simila al mia nuna en hotelo Eden en Laguna: ĝi estis tute moderna, mebligita laŭ usona gusto. Sur la strato ekster la hotelo ruliĝis aŭtoj, sed en malpli densaj vicoj ol ĉi tie, sed la fabrikmarkoj estis proksimume la samaj kiel sur Cleo Street. Apud la hotelo, same kiel ĉi tie apud Eden,

situis benzinejo, kie oni anoncis la diversajn benzinomajn en la angla lingvo. En la centro de la loko estis bufedo, kie oni servis glaciaĵojn, kokakolaon kaj hamburgerojn. Tie estis diskogurdo, el kiu fluadis senĉese kantoj kaj muziko; estis popularaj usonaj kantoj. Super la vendotablo pendis ŝildo: "Drive-in-bar". Sur la afiŝtabulo oni sciigis, ke "Sweden Artists" ludas en "Jack Dalley Show" en la popolamuzejo, kie la ege populara twist-orkestro de "The Andersons", "Sound Twist Pop" respondecas pri la dancmuziko.

Usono estas antaŭ mi, kaj iom post iom ekloĝas en mia malnova hejmgregiono. Je ĉiu vizito, kiun mi faris en mia patrujo, mi rimarkis iun transformiĝon; ĉiufoje Svedio ŝajnis al mi malpli sveda.

Nun mi refoje faris flugvojaĝon al la patrolando. Sed mi ne vojaĝis por reveni. Mi ne venis al mia hejmgregiono por resti tie. Eĉ ne unu momenton tuŝis min la ideo, ke retranslokiĝo al Svedio estus ebla por la maljuna usonemigrinto, kiu portas mian nomon. La sved-amerikanoj, kiuj en mia aĝo reiras por retrovi sian infanaĝan hejmgregionon, fariĝas viktimoj de memtrompo. Al tiu songolando ne ekzistas reiro por iu ajn. Oni povas reveni laŭ ekstera senco, al la tero, domoj, arboj, akvoj, arbaretoj. Oni povas reveni al la objektoj, sed neniam al tiu ejo, kie la animo de la infano vivis. Ne ekzistas reveno al

tiu mondo, kie la infaneto fariĝis plenkreskulo, kiu fariĝis revoj kaj memoroj kaj restos revoj kaj memoroj. Ĉi tie mi staras malakceptita ekster pordo, kiu por ĉiam restos fermita.

Post pli ol kvardekjara loĝado en Usono mi estas fremdulo en tiu lando, kie mi naskiĝis kaj plenkreskis. La patro kaj patrino mortis, ĉiuj miaj gefratoj mortis. Ankorau vivas kelkaj el miaj parencoj kaj kelkaj el miaj samaguloj el la tempo de mia kresko, sed por ili mi estas preskaŭ forgesita. Mi estas nur nomo, kiun oni mencias kun la aldono: li, kiu vojaĝis al Ameriko.

Ĉi tio estus mia lasta vizito en Svedio. Kion mi volus fari en la hejmlando? Mi volis vidi ankoraŭ unufoje la infanaĝan hejmregionon en somero. Mi volis meti florkronon sur la komunan tombon de miaj gepatroj. Mi volis ankoraŭfoje viziti la tombejon de la hejmloko, kie miaj gepatroj kaj gefratoj unuiĝis kun la grundo. Mi volis refoje vidi tiun lokon, kie la homoj el miaj parenca-ro dum multaj generacioj fariĝis denove pulvo. La kreskado de la parenca-ro, vivo, migrado tra la mondo kaj malapero en la grundon — tiun ĉi eternan ripetigon mi vidas plej klare ĉe la korto de la mortintoj en la hejmloko.

Mi konas sved-amerikanojn, kiuj en siaj maljunaj jaroj retranslokiĝis al Svedio, ĉar ili volis kuŝi enterigitaj kune kun siaj parencoj kaj reunuiĝi kun ili: la reveno de

la infano al la sino patrina. Mi povas kompreni la revenintojn kaj senti kun ili, sed mi mem ne kaptiĝas de tiu sang- kaj gentmistiko. Kion signifas al mi tiu terpeco sur nia globo, kie la grundo reprenos mian senvivan korpon? Tiu korpo ne plu estas mi, kio okazos kun ĝi, tio ne povas esti mia afero.

Sed la loka tombejo estas tiu loko en la hejmrregiono, kie nun estas kuniĝintaj preskaŭ ĉiuj ili, kiuj apartenis al tiu mondo, kiu iam estis mia. Tie ili estas, malaperintaj kune kun tiu mondo.

*

Iun vesperon en la komenco de junio mi depaŝis de la vagonaron ĉe la stacidomo de mia infanaĝo. Iun vesperon en majo antaŭ kvardek du jaroj ĉe la sama stacidomo mi surpaŝis la vagonaron kaj vojaĝis en la direkton, de kie mi nun venis. Tio estis la tago de mia elmigro. Mi memoris kaj pensis: inter tiuj du vesperoj pasis la esenco de mia vivo.

Mi metis mian valizon sur la peronon. Dum kelkaj minutoj post la elvagoniĝo mi staris silente apud la valizo, kvazaŭ mi per tio estus soleniganta la memoron de la forvojaĝo kvardek du jarojn pli frue. Tiam mi ne estis sola. Mia fratino Jenny sekvis min al la vagonaro (patro kaj panjo ne volis kunesti). Kaj mi adiaŭis al kelkaj ho-

moj, kiuj staris sur la perono. En tiu vespero mi estis la plej atentata persono ĉe la rapidvagonaro.

Nun mi staris sola. Neniu venis atendi min. Neniu sciis, ke mi estus venanta. Homoj amasiĝis ĉe la stacidomo, sed mi ne vidis iun, kiun mi rekonis. Nek iu rekonis min.

Mi ĵetis rigardon post mia vagonaro, kiu malaperis en la kurbiĝon, kie antaŭe staris religardista dometo. Dum la lastaj horoj de mia fervoja vojaĝo mi estis sola vojaĝanto en la kupeo. La kondukto diris, ke oni planas ĉesigi la fervojon, ĉar la aŭtobusoj transprenis la persontrafikon. En la jaro 1872 la fermita mondo de tiu ĉi regiono malfermiĝis per la ferreloj. Dum 90 jaroj la radoj de la trajnoj ruladis dum ŝtalmejoj. Mia patrino rakontis, ke ŝi ĉeestis kiel sesjara knabino la inaŭguron kaj ŝi estis vidinta la reĝon; tio estis grandega okazaĵo por ŝi, ĉar tio estis la sola fojo en ŝia vivo, ke ŝi vidis iun reĝon.

Ni knaboj iris ĉiudimance al la stacio por rigardi la vagonaron, kiu haltis malpli ol minuton. Ni rigardis ĉefe la lokomotivon, kiu tusadis el si vaporon, tiel ke ĝi sonis kiel ridego de giganto. Nun post 90-jara servo la radoj ekstaros kaj oni starigos la lokomotivon en muzeo, kie gejunuloj de iu nova tempo priridos tiun malnovan strangan aĉajon.

Mi rigardis laŭlonge de la relvojo en la alian direkton, kie la rekta distanco estis longa. Multaj ŝtalmejoj kondamnitaj al ĉesado streĉas sin en tiun direkton tra la kamparo. Baldaŭ silentiĝos la bruo de la vagonaro, la arbaro reprenos baldaŭ sian teron, kaj kvieto regos laŭlonge de la forlasita vojo. Kaj en tempo venonta oni diras: Ĉi tie streĉis sin iam relvojo. Ni povas ankoraŭ vidi spuron post ĝi.

La homoj, kiuj kolektiĝis sur la kajo ĉe la alveno de la vagonaro, estis disiĝantaj. Mi restis sola staranta apud mia valizo, kiel erariranta fremdulo. Komplezema preteriranta fervojisto alparolis min: Estas taksistacio malantaŭ la stacidomo, se mi volas havigi aŭtomobilon. Mi dankis — — — sed la nova fervojhotelo situis sufiĉe proksime. Mi povis piediri tiun mallongan vojon.

Mi ja sciis, ke granda vilaĝo elkreskis ĉirkaŭ la fervoja stacio, dum mi estis for. Novaj stratoj, novaj domoj, butikoj, benzinejoj; aŭtobusoj venis plenaj da pasaĝeroj. Mi sciis de mia antaŭa vizito, ke mia loko estis fundamente transformigita.

Nun mi trovis, ke novaj grandaj transformiĝoj okazis post la lasta fojo. Mi fariĝis surprizita pro la multajn novaĵoj, kiuj venis de ekstere, precipe el Usono. Sed tiuj, kiujn oni estis transpreninta el Usono kaj transplantis ĉi tien, ne konvenis al la vilaĝo, ili ŝajnis al mi maldecaj en

la ĉirkaŭaĵo, mi ne povis imagi ilin en mia Smolanda hejmregiono. Ili estis taŭgaj por mi en alia lando, sed ĉi tie ili ŝajnis al mi iamaniere fremdaj.

Mi vagis erarirante ĉirkaŭe en la hejmloko. Mi ne rekonis la homojn, kiujn mi renkontis survoje, kaj ili ne rekonis min. Mi renkontis kelkajn samaĝulojn el la juneo, sed nur kun peno mi retrovis ilin en iliaj aliĝintaj kaj maljuniĝintaj vizaĝoj. Ili ne estis la samaj homoj, kiujn mi estis koninta. Kaj ankaŭ ili trovis min malfacile en mia vizaĝo. Ili sciis, kiu mi estas, sed ili miskredis, kion ili sciis. Ni estis fremduloj, kiuj renkontiĝis. Kaj por la parencoj, kiuj ekkreskis, post kiam mi forlasis mian hejmlokon, mi ŝajnis kiel reaperanto, kiu subite reviviĝis el la pasinteco. Por ili mi estis iu fantomo, fantomo de iu mortinta homo, kiu revenis al la vivo kaj volis trudi sin en la domon, kie li iam estis loĝinta.

Mi estis revenanta — — — kaj nerevokeble neenlasita. Mi sentis min kiel turisto en mia patrujo. Mi ricevis la definitivan decidon: Mi ne plu apartenas ĉi tie. La loko, al kiu mi iam apartenis, ne plu ekzistas.

Kaj kiam mi vagadis inter la nekonataj homoj en la fremda regiono, mi rememoris legendon, kiun mia avino rakontis al mi — — — ĝi kaptis min tiel forte, ke mi petis ŝin plurfoje rakonti ĝin al mi denove:

Estis iam du amikoj, kiuj estis donintaj sanktan promeson unu al la alia. Ili promesis veni al la geedziĝo unu

de la alia, kie ajn ili estus tiam. Unu el ili mortis, kaj post iom da tempo la alia festus sian geedziĝon. Li funebris profunde, ke lia plej kara amiko ne povis ĉeesti. Sed malfrue en la nokto venis la mortinta amiko al la geedziĝa korto. Li sidis malantaŭ la pordo de la vestiblo kaj li ne volis ricevi alian gastaĵon ol plenmanon da tero kaj trinkpoton da akvo. Sed kiam oni ekludis al la novedzina danco, la mortinto honoris la novedzinon de la vivanta amiko kaj li dancis kun ŝi trifoje. Poste, kiam li estis forironta, li diris al la novedzo: Nun ankaŭ vi devas plenumi vian promeson! Ankaŭ mi festas mian geedziĝon hodiaŭ vespere, kaj vi sekvos min al la geedziĝa korto! La novedzo estus volinta resti ĉe sia juna novedzino, sed li ne povis malplenumi sian promeson al la amiko. Li sekvis la mortinton je la reirvojo.

Ambaŭ amikoj venis al biendomo, kie amasiĝis homoj en lumigita salono. Ili eniris al la geedziĝa festo, kaj la mortinto diris al sia amiko: Mi dancis trifoje kun via novedzino. Nun ankaŭ vi dancu kun mia novedzino.

Kaj la vivanto dancis trifoje kun la novedzino de la mortinto. Poste li reiris al sia propra geedziĝa korto.

Li estis for dum nur mallonga tempo. Sed kiam li revenis al la vilaĝo, kiun li ne longe estis forlasinta, ĉio estis ŝanĝita. La geedziĝa korto, kie li lasis sian novedzinon, estis for, kaj sur la loko staris nova domo, kie loĝis

por li tute nekonataj homoj. Li iris al aliaj bienetoj, sed el la homoj, kiujn li vidis kaj renkontis, neniun li konis kaj neniun konis lin. Tiam li iris al la pastro, kiu antaŭ nelonge edzigis lin kun lia fianĉino. Sed ankaŭ la pastro estis fremdulo. Li prezentis sin kaj diris, kiel lia bieneto nomiĝas kaj ke en la vespero de sia geedziĝo li sekvis mortintan amikon al lia geedziĝo en la mortoregno. Sed nun li retrovas nek sian edzinon nek la domon.

La pastro malfermis la malnovajn registrojn kaj post longa serĉado li trovis, ke ĉio, kion ĉi tiu viro diris, estis vero. Lia nomo staris en la libroj, sed tiu nomo apartenis al mortinta vilaĝano. Li estis mortdeklarita de longa tempo. La registroj montris, ke tri jarcentoj pasis, de kiam li loĝis en la vilaĝo, kie li ankaŭ festis sian geedziĝon antaŭ tri jarcentoj.

Pasis unu jarcento dum ĉiu danco, kiun li dancis kun la edzino de la mortinta amiko. Kaj kiam li aŭdis tion, ekzistis por li nur unu ago: reiri al la regno de la mortintoj.

Nun mi sentis min mem kiel reaperanto de tiu legendo, kiu nek trovis sian edzinon nek la bieneton. Mi estis nekonata persono en nekonata vilaĝo, kiu estis loĝata de nekonataj homoj. Mi estis foririnta dum malpli da tempo ol la viro en la legendo — — — nur kvardek jaroj pasis, de post kiam mi estis loĝinta en la loko. Sed mi

estus povinta esti for dum tri jarcentoj, tio ja ne farus pli grandan diferencon, mi ne estus povinta senti min pli fremda. Mi reaperis el la pasinteco kaj mi vagadis kaj fantomis en mia hejmregiono.

Mi estus povinta, same kiel la alia reaperanto, iri al la popolregistranto de la vilaĝo. Se li estus malferminta la popolregistron, li estus trovinta en ĝi, ke mi naskiĝis en la paroĥo Sjöholt antaŭ sesdek kvar jaroj. Plue li estus trovinta, ke mi estas filo de servutbienisto Ernst Gottfrid Karlsson kaj lia edzino Anna Magdalena Johansdotter, loĝintaj en la servutbieno sur Lindkullen, apartenanta al vilaĝo Högaberg, pli poste posedanto de deksecona hubo en la vilaĝo Källebäck. La popolregistranto estus ankaŭ vidinta en la libro, ke mi prenis translokiĝan ateston okaze de mia vojaĝo al Usono en majo 1920 kaj ke mi restas sola sur tiu ĉi tero el la ok infanoj de la geedzoj Karlsson.

Mi estas la sola vivanto el tiu infanaro, kiu naskiĝis en la servutbienista dometo sur Linkullen, kiu ampleksis unu ĉambron kaj kuirejon. Sed mi ne serĉis tiun dometon, ĝi ja estis for jam kiam mi forvojaĝis, mi ne serĉis malaperintan edziĝkorton kaj neniun edzinon. Mi ne serĉis domon, nek vivantajn homojn. Mi venis por vizito al la mortintoj.

Mi restis en Svedio dum ses semajnoj. Same longa estis mia lasta vizito somere 1949, kiam mia patro mor-

tis. Mia patrino mortis kvin jarojn antaŭ li; tio okazis dum la dua mondmilito, kaj mi ne povis veni al la enterigo.

Tiam mi restis tuttempe en mia hejmmregiono. Plejparton de la tagoj mi uzis por migri en la ĉirkaŭaĵo. Eble mi povus trovi kelkajn lokojn, kie mi retrovus min kiel nudpieda knabo. Sed eĉ la boskoj estis aliĝintaj. Mi serĉis arbarmaldensejojn kaj arbustejojn, kie mi satiĝis de sovaĝaj fragoj kaj mirteloj, mi serĉis la arbarmadensejojn kun vakcinioj, muskejojn kaj marĉejojn, kie mi kolektis acidecajn oksikokojn, disŝutataj kiel ruĝaj perloj super la tufaĵoj.

Sed arbustejoj kaj arbarmaldensejoj estis plenkreskigitaj de fortika, matura arbaro, kaj marĉejoj kaj muskoj estis drenfositaj kaj kovritaj de aveno anstataŭ oksikoko. Kie antaŭe estis arbaro, estis nun eltranĉaĵoj kaj inverse — — — mi ne rekonis ion. Mi erariris, vagis trafemaltrafe, migris ĉirkaŭen, embarasite sur la kampoj de mia naskiĝloko.

Sed dum unu el miaj vagadoj mi venis al juniperaltaĵo, kiu apartenis iam al nia bieneto en la vilaĝo Källebäck. Ĝi situis en malgranda enfermejo, kie ni paŝtis niajn ŝafinojn, kaj ni nomis ĝin ŝafinejo. Ĉi tie staris ankoraŭ la maljunaj sekaj, kalvaj juniperoj. La juniperaltaĵo de miaj knabjaroj similis sin mem: tie mi retrovis min mem.

Mi amas la juniperon kaj ĝiajn fruktojn, la amarajn, malmolajn berojn; el ili oni faras bieron, kiu donas guston de arbaro al la lango. La junipera biero, kiun mia patrino faris, estis la bona trinkaĵo de mia infanaĝo. Mi amas la juniperarbuston, la mallogan, la nenecesan, kiun oni forigas por doni spacon al pli utilaj arboj, la persistan, la rezistan, kiun neniam oni povas elradikigi, la neŝatatan, kiu nek karesas nek flatas, kiu ne lasas sin kulturi, sed kreskas laŭ propra volo, arbusto kun pikaj branĉetoj, sarkaĵo de la arbaro. Oni detranĉas ĝin, oni bruligas ĝin, oni eltiras ĝin kune kun ĝiaj radikoj, tamen ĝi denove kreskas kaj revenas. Kaj fine ĝi venas al la korto, sed ne pli frue ol por funebro: kiam iu mortis en la domo, laŭ malnova kutimo la plej bela junipero el la arbareto devas stari ekstere ĉe ambaŭ flankoj de la perono de la enirejo. Fine honoriĝas la herbaĉo de la arbaro.

Ĉi tie sur la altaĵo de nia malnova ŝafenfermejo staris nun la strangulo da la tereno, la sama, kiu kreskis en mia infanaĝo. Fariĝis revido. Mi prenis per miaj ambaŭ brakoj unu el la plej grandaj juniperoj. Ĝi respondis tiel, ke ĝi pikvundetis miajn manojn. Ĝi gratis min per siaj akraj branĉetungejoj, tiel ke bruldoloris en la haŭto. Estiĝis dolora ĉirkaŭbrakado, bruldoloris longe, sed en tiu momento mi sentis, ke mi estis reveninta. Mi estis denove hejme.

Sur la juniperaltaĵo okazis kaj revido kaj adiaŭo. Mi neniam plu revidos la lokon, kie mi naskiĝis.

Post ses semajnoj kiel reaperinto en mia malnova patrujo mi revenis al la lando, kie mi mortos.

Vilhelm Moberg

Komencaj paĝoj el samnoma romano

El la sveda tradukis Szilárd Szabad

La kafejo en Surat

(*Transfarite laŭ Bernardin-de-St.-Pierre*)

En la hinda urbo Surat estis kafejo. Kunvenadis tie ĉi el diversaj landoj vojaĝantoj kaj alilanduloj kaj ofte interparoladis.

Venis tien unu fojon persa instruita teologo. La tutan vivon li esploradis la esencon de la Dieco, legadis kaj skribadis librojn pri tio ĉi. Longe li meditadis, legadis kaj skribadis pri Dio, iris tro malproksimen, ĉio en la kapo

Ĉi tiu rakonto/artikolo de Lev Tolstoj aperis en *La Esperantisto* 1895, n-ro 4. Laŭdire pro ĝi la rusa cenzuro malpermesis pluan distribuon de la revuo en la lando kaj *La Esperantisto* devis ĉesi aperi. Laŭ informo en la sola numero, kiu aperis post tiu ĉi, tri kvaronoj de la abonantoj estis ĝuste el Rusio.

Legante la artikolon oni miras, kio ĝenis la caran cenzuron. Ĉu ne en la vero artikolo en pli frua numero, pri "Milito Ĥina-Japana" pli ĝenis? Ĝin tamen ne verkis Lev Tolstoj, sed iu pli anonima P. B-ĝe, do ne same interesa por esperantistoj.

La rakonto estas lingve en la origina formo, escepte de evidentaj preseraroj, kiujn mi korektis. Mankas indiko pri tradukinto. | FL

al li konfuziĝis kaj li venis al tio, ke li ĉesis kredi je Dio. Pri tio eksciis la reĝo kaj elpelis lin el la persa regno.

Tiel meditante la tutan vivon pri la unua kaŭzo de ĉio, la malfeliĉa teologo konfuziĝis, kaj, anstataŭ kompreni, ke li perdis la prudenton, li pensis, ke malaperis la plej alta prudento, kiu regas la mondon.

Tiu ĉi teologo havis sklavon afrikanon, kiu iradis kun li ĉien. Kiam la teologo eniris en la kafejon, la afrikano restis en la korto post la pordo kaj sidiĝis sur ŝtonon sub la lumo de la suno; li sidis kaj forpeladis de si muŝojn. Kaj la teologo mem kuŝiĝis sur kanapon en la kafejo kaj lasis doni al si tason da opiumo. Kiam li eltrinkis la tason kaj la opiumo komencis movi lian cerbon, li turnis sin al sia sklavo;

”Kio, malestiminda sklavo,” diris la teologo, ”diru al mi, kiel vi pensas, ĉu ekzistas Dio aŭ ne ekzistas?”

”Kompreneble, ekzistas!” diris la sklavo kaj tuj eltiris el post sia zono malgrandan lignan idolon. ”Jen,” diris la sklavo, ”jen estas, tiu dio, kiu min gardas de tiu tempo, de kiu mi vivas en la mondo. Tiu ĉi dio estas farita el branĉo de tiu sama sankta arbo, kiun adoras ĉiuj en nia lando.”

Tiun ĉi interparolon inter la teologo kaj la sklavo ek-aŭdis la estintaj en la kafejo kaj ekmiris. Mirinda ŝajnis al ili la demando de la sinjoro kaj ankoraŭ pli mirinda la

respondo de la sklavo. Unu brameno, kiu aŭdis la vortojn de la sklavo, turnis sin al li kaj diris:

”Malfeliĉa sensaĝulo! Ĉu oni povas pensi, ke Dio povus sin trovi post la zono de ia homo? Dio estas unu — Bramo. Kaj tiu ĉi Bramo estas pli granda ol la tuta mondo, ĉar li kreis la tutan mondon. Bramo estas la sola, granda Dio, tiu Dio, al kiu estas konstruitaj sanktejoj sur la bordoj de la rivero Gangeso, tiu Dio, al kiu servas liaj solaj pastroj — la bramenoj. Nur tiuj ĉi pastroj konas la veran Dion. Pasis jam dudek mil jaroj, kaj kiom ajn renversoj estis en la mondo, tiuj ĉi pastroj restas tiaj samaj, kiaj ili estis ĉiam, ĉar Bramo, la sola, vera Dio, protegas ilin.”

Tiel diris la brameno, pensante, ke li konvinkos ĉiujn; sed hebrea ŝanĝisto, kiu tie ankaŭ sin trovis, rediris al li:

”Ne,” li diris. ”La sanktejo de la vera Dio estas ne en Hindujo! Kaj Dio protegas ne la kaston de la bramenoj! La vera Dio estas ne Dio de la bramenoj, sed Dio de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo. Kaj favoras la vera Dio nur sole al sia popolo Izraela. Dio de la komenco de la mondo senĉese amis kaj amas nian solan popolon. Kaj se nun nia popolo eĉ estas diŝjetita en la mondo, tio ĉi estas nur elprovo, sed Dio, kiel li promesis, kolektos denove sian popolon en Jerusalemon, por rekonstrui la mirindaĵon de la antikveco, la Jerusaleman sanktejon, meti Izraelon kiel estron super ĉiuj popoloj.

Tiel diris la hebreo kaj ekploris. Li volis daŭrigi la paroladon, sed italo, kiu tie sin trovis, interrompis lin:

”Malveron vi diras,” diris la italo al la hebreo. ”Vi alskribos al Dio maljustaĵon. Dio ne povas ami unu popolon pli ol la aliajn. Kontraŭe, se li eĉ favoris antaŭe Izraelon, jen pasis jam 1800 jaroj de tiu tempo, kiam Dio ekkoleris kaj por signo de sia kolero ĉesigis la ekzistadon de tiu ĉi popolo kaj distris tiun ĉi popolon sur la tero, tiel ke, tiu ĉi religio ne sole ne disvastiĝas, sed nur tie aŭ alie restos. Dio donos preferon al nenia popolo, sed li vokas ĉiujn tiujn, kiuj volos sin savi, en la rifuĝejon de la sola Roma katolika eklezio, ekster kiu ne ekzistas savo.”

Tiel diris la italo. Sed protestanta pastro, kiu tie staris, paliĝinte respondis al la katolika misionero:

”Kiel vi povas diri, ke savo estas ebla nur en via religio? Sciu, ke savitaj estos nur tiuj, kiuj laŭ la Evangelio servos al Dio en la spirito kaj vero laŭ la leĝo de Jezuso.”

Tiam turko, kiu servis en la Surata limdepagejo kaj tie ĉi sidis, fumante pipon, kun grava mieno turnis sin al la ambaŭ kristanoj:

”Vane vi estas tiel certigitaj je la vereco de via Roma religio,” li diris. ”Via religio jam antaŭ ĉirkaŭ sescent jaroj estas anstataŭita per la vera religio de Mahometo. Kaj, kiel vi mem vidas, la vera religio, de Mahometo ĉiam pli kaj pli disvastiĝas tiel en Eŭropo, kiel ankaŭ en Azio kaj eĉ en la klera Ĥinujo. Vi mem konfesas, ke la

hebreoj estas forĵetitaj de Dio, kaj kiel pruvon de tio ĉi vi montras tiun fakton, ke la hebreoj estas malaltigataj kaj ilia religio ne disvastiĝas. Konfesu do la verecon de la religio de Mahometo, ĉar ĝi estas en plena grandeco kaj ĉiam pli disvastiĝas. Savitaj estos nur tiuj, kiuj kredas je la lasta profeto de Dio, je Mahometo. Kaj eĉ el tiuj ĉi nur la partianoj de Omaro kaj ne de Ali, ĉar la partianoj de Ali estas herezuloj.”

Ĉe tiuj ĉi vortoj la persa teologo, kiu apartenis al la sekto de Ali volis kontraŭparoli. Sed en la kafejo en tiu minuto komenciĝis granda disputado inter ĉiuj alilanduloj de diversaj religioj kaj sektoj, kiuj tie sin trovis. Tie estis abesinaj kristanoj, hindaj lamoj, izmaelidoj kaj fajradorantoj. Ĉiuj disputis pri la esenco de Dio kaj pri tio, en kia maniero oni devas adori Lin. Ĉiu konfirmis, ke nur en lia lando oni konas la veran Dion kaj oni scias, kiel oni devas Lin adori. Ĉiuj disputis kaj kriis. Nur unu ĥino, kiu tie estis, religiano de Konfucio, sidis trankvile en angulo de la kafejo kaj ne partoprenis en la disputoj. Li trinkis teon, aŭskultis, kion oni parolis, sed mem li silentis. La turko, kiu rimarkis lin en la mezo de la disputado, turnis sin al li kaj diris:

”Subtenu min almenaŭ vi, bona ĥino. Vi silentas, sed vi povus diri ion al mia bono. Mi scias, ke ĉe vi en Ĥinujo estas nun enkondukataj diversaj religioj. Viaj komercistoj ofte diradis al mi, ke viaj ĥinoj el ĉiuj religioj kal-

kulas la mahometan la plej bona kaj volonte ĝin akceptas. Subtenu do miajn vortojn kaj diru, kion vi pensas pri la vera Dio kaj pri Lia profeto.”

”Jes, jes, diru, kion vi pensas,” turnis sin al li ankaŭ la aliaj.

La ĥino, sekvanto de Konfucio, fermis la okulojn, ekmeditis kaj poste, malferminte la okulojn, eletendis la manojn el la larĝaj manikoj de sia vesto, kunmetis ilin sur la brusto kaj ekparolis per mallaŭta kaj trankvila voĉo.

”Sinjoroj,” li diris, ”ŝajnas al mi, ke la memamo de la homoj pli ol ĉio alia malhelpas al ilia konsenteco en la afero de religio. Se vi volos min aŭskulti, mi klarigos tion ĉi al vi per ekzemplo.

Mi elveturis el Ĥinujo Suraton sur angla vaporŝipo, kiu ĉirkaŭveturis la tutan mondon. En la vojo ni haltis apud la orienta bordo de la insulo Sumatro, por preni akvon. En tagmezo ni eliris sur la teron kaj sidiĝis sur la bordo de la maro en la ombro de kokosaj palmoj, ne malproksime de unu vilaĝo de la insulanoj. Ni sidis kelke da homoj el diversaj landoj.

Dum ni sidis, al ni alvenis blindulo. Tiu ĉi homo blindiĝis, kiel ni poste eksciis, de tio, ke li tro longe kaj obstine rigardadis la sunon, ĉar li volis ekkompreni, kio estas la suno. Li volis tion ĉi ekscii, por ekposedi la lumon de la suno.

Longe li penadis, faradis uzon el ĉiuj sciencoj, li volis kapti kelke da radioj de la suno, kapti ilin kaj fermi en botelon. Longe li penadis kaj ĉiam rigardadis la sunon kaj nenion povis fari, sed malsaniĝis al li la okuloj kaj li blindiĝis. Tiam li diris al si:

‘La lumo de la suno ne estas fluidaĵo, ĉar se ĝi estus fluidaĵo, oni povus transversadi ĝin kaj ĝi ŝanceliĝadus de la vento kiel akvo. La suna lumo ankaŭ ne estas fajro, ĉar se ĝi estus fajro, ĝi estingiĝus en akvo. La lumo ankaŭ ne estas spirito, ĉar oni povas ĝin vidi, kaj ankaŭ ne korpo, ĉar oni ne povas ĝin movi. Kaj ĉar la lumo de la suno estas nek fluidaĵo, nek firmaĵo, nek spirito, nek korpo, sekve la lumo de la suno estas — nenio.’

Tiel li decidis, kaj samtempe de tio, ke li ĉiam rigardadis la sunon kaj ĉiam pensadis pri ĝi, li perdis tiel la vidadon, kiel ankaŭ la prudenton. Kaj kiam li fariĝis tute blinda, tiam li jam plene certiĝis, ke la suno ne ekzistas.

Kun tiu ĉi blindulo alvenis ankaŭ lia sklavo. Li sidigis sian sinjoron en la ombron de kokosa arbo, levis de la tero kokosan frukton kaj komencis fari el ĝi noktan lampeton. Li faris meĉon el kokosa fibro, elpremis el la frukto oleon en la ŝelon kaj trempis en ĝin la meĉon.

Dum la sklavo faradis sian lampeton, la blindulo, ekĝeminte, diris al li:

'Nu, kiel, sklavo? Ĉu veron mi al vi diris, — ke la suno ne ekzistas? Vi vidas, kiel mallume estas. Kaj oni diras, ke la suno . . . Kaj kio do estas la suno?'

'He, mi ne scias, kio estas suno,' diris la sklavo. 'Ĝi min tute ne interesas. Sed lumon mi scias. Jen mi faris lampeton, kaj al mi estos lume, kaj ankaŭ al vi mi povas fari servon kaj ĉion trovi en mia tendo.'

Tie ĉi ankaŭ sidis lamulo kun lambastono. Li tion ĉi aŭdis kaj ekridis. 'Oni vidas, ke vi estas blinda de naskiĝo,' li diris al la blindulo, 'kiam vi ne scias, kio estas la suno. Mi diros al vi, kio ĝi estas: la suno estas fajra globo, kaj tiu ĉi globo ĉiun tagon eliras el la maro kaj ĉiun vesperon kuŝiĝas en la montoj de nia insulo; tion ĉi ni ĉiuj vidas, kaj vi ankaŭ vidus, se vi ne estus blinda.'

Fiŝisto, kiu tie ankaŭ sidis, aŭdis tiujn ĉi vortojn kaj diris al la lamulo:

'Oni tuj vidas, ke vi nenie estis ekster via insulo. Se vi ne estus lama kaj se vi estus iom veturinta sur la maro, vi sciis, ke la suno kuŝiĝas ne en la montoj de nia insulo, sed kiel ĝi eliras el la maro, tiel ĝi, vesperereturne ankaŭ malleviĝas en la maron. Mi diras ĝuste, ĉar mi ĉiun tagon vidas tion ĉi per miaj propraj okuloj.'

Aŭdis tion ĉi hindo.

'Mi miras,' li diris, 'kiel prudenta homo povas paroli tiajn malsaĝaĵojn. Ĉu estas eble, ke fajra globo sin mallevu en akvon kaj ne estingiĝu! La suno tute ne estas

fajra globo, sed la suno estas Dio. Tiu ĉi Dio estas nomata Devo. Tiu ĉi Dio veturas en kaleŝo sur la ĉielo ĉirkaŭ la ora monto Speruvo. Okazas, ke la malbonaj serpentoj Ragu kaj Ketu atakas Devon kaj englutas lin, kaj tiam fariĝas mallume. Sed niaj pastroj preĝas pri tio, ke la Dio liberiĝu, kaj tiam ĝi liberiĝas. Nur tiaj malkleraj homoj, kiel vi, kiuj neniam veturis pli malproksimen al ilia insulo, povas imagi, ke la suno lumas nur sur ilian insulon.’

Tiam ekparolis mastro de egipta ŝipo, kiu tie ankaŭ sin trovis:

’Ne,’ li diris, ’tio ĉi ankaŭ estas malvera, la suno ne estas Dio kaj ne iras sole ĉirkaŭ Hindujo kaj ĝia ora monto. Mi multe ŝipadis sur la Nigra maro, laŭ la bordoj de Arabujo, mi estis ankaŭ sur Madagaskaro kaj ankaŭ sur la insuloj Filipinaj, — la suno lumigas ĉiujn landojn, ne solan Hindujon, ĝi ne iras ĉirkaŭ unu monto, sed ĝi leviĝas ĉe la insuloj de Japanujo, kaj tial ankaŭ tiuj ĉi insuloj estas nomataj Japen, t. e. — en ilia lingvo — naskiĝejo de la suno, kaj ĝi kuŝiĝas malproksime, malproksime en la okcidento, post la insuloj de Anglujo. Mi tion ĉi bone scias, ĉar mi mem multe vidis kaj mi ankaŭ multe aŭdis de mia avo. Kaj mia avo ŝipadis ĝis la finoj mem de la maro.’

Li volis ankoraŭ paroli, sed angla ŝipsoldato de nia ŝipo interrompis lin: ’Ne ekzistas lando krom Anglujo,’

li diris, 'kie oni pli bone scius pri tio, kiel la suno iras. La suno — ni ĉiuj tion ĉi scias en Anglujo — nenie leviĝas kaj nenie malleviĝas. Sed ĝi iradas senĉese ĉirkaŭ la tero. Ni tion ĉi bone scias, ĉar ni mem jen ĵus ĉirkaŭveturis la tutan teron kaj nenie ni atingis la sunon. Ĉie ĝi, tiel same kiel tie ĉi, matene montriĝas kaj vespere sin kaŝas.'

Kaj la anglo prenis bastonon, desegnis sur la sablo rondon kaj komencis klarigadi, kiel la Suno iras tra la ĉielo ĉirkaŭ la tero. Sed li ne povis bone klarigi, kaj, montrinte la direktiston de sia ŝipo, li diris:

'Li cetere estas pli saĝa, al mi, kaj li pli bone tion ĉi al vi klarigas.'

La direktisto. estis homo prudenta kaj aŭskultis la interparolon silente, dum oni lin ne demandis. Sed nun, kiam ĉiuj sin turnis al li, li komencis paroli kaj diris:

'Ĉiuj vi trompas unu alian kaj ankaŭ vin mem. La suno ne turnas sin ĉirkaŭ la tero, sed la tero sin turnas ĉirkaŭ la suno kaj ankoraŭ mem sin turnas, elmetante kontraŭ la suno en la daŭro de dudek kvar horoj tiel Japanujon, kiel ankaŭ la insulojn Filipinajn, kaj ankaŭ Sumatron, sur kiu ni sidas, kaj Afrikon, kaj Eŭropon, kaj Azion, kaj multon ankoraŭ da aliaj landoj. La suno lumas ne por unu sola monto, ne por unu insulo, ne por unu maro kaj eĉ ne por unu tero, sed por multaj tiaj samaj planedoj kiel la tero. Ĉion tion ĉi ĉiu el vi povus kompreni, se li rigardadus supren al la ĉielo kaj ne mal-

supren al siaj piedoj kaj ne pensus, ke la suno lumas nur por li sola aŭ por lia patrujo sole.’

Tiel diris la saĝa direktisto, kiu multe veturis tra la mondo kaj multe rigardadis supren al la ĉielo.”

”Jes, la eraroj kaj malkonsentoj de la homoj en la afero de religio venas de memamo,” daŭrigis la ĥino, lernanto de Konfucio. ”Kio estas kun la suno, tio sama estas kun Dio. Ĉiu homo volas, ke li havu sian propran Dion, aŭ almenaŭ Dion de sia hejma lando. Ĉiu popolo volas fermi en sia sanktejo Tiun, kiun ampleksi ne povas la tuta mondo. Kaj ĉu povas ia sanktejo kompari sin kun tiu sanktejo, kiun konstruis Dio mem, por unuigi en ĝi ĉiujn homojn en unu religion, en unu kredon? Ĉiuj homaj temploj estas faritaj laŭ la modelo de tiu ĉi templo — la mondo de Dio. En ĉiuj temploj sin trovas lavuoj, arkaĵoj, sanktaj lampoj, sanktaj figuroj, surskriboj, libroj de leĝoj, oferoj, altaroj kaj pastroj. En kia do templo sin trovas tia lavujo kiel la oceano, tia arkaĵo kiel la arkaĵo ĉiela, tiaj lumiloj kiel la suno, luno kaj steloj, tiaj figuroj kiel vivaj homoj reciproke amantaj kaj helpantaj unu alian? Kie sin trovas surskriboj pri la boneco de Dio tiom same kompreneblaj kiel tiuj bonfaroj, kiuj ĉie estas disĵetitaj de Dio por la feliĉo de la homoj? Kie estas tia libro de leĝoj, kiu estus tiel klara al ĉiu kiel tiu libro, kiu estas skribita en lia koro? Kie estas oferoj similaj al tiuj sin-memoferoj, kiujn amantaj homoj alportas al siaj proksi-

muloj? Kaj kie estas altaro simila al la koro de bona homo, sur kiu Dio mem akceptas oferon? Ju pli alte homo komprenos Dion, tiom pli bone li Lin konos. Kaj ju pli bone li konos Dion, des pli multe li proksimiĝados al Li, imitados Lian bonecon, kompatemecon kaj amon al la homoj. Kaj tial tiu, kiu vidas la tutan lumon de la suno plenigantan la mondon, ne kondamnu kaj ne malestimu tiun superstiĉan homon, kiu en sia idolo vidas nur unu radion de tiu sama lumo; li ne malestimu ankaŭ tiun nekredanton, kiu blindiĝis kaj tute ne vidas lumon.”

Tiel diris la ĥino, lernanto de Konfucio, kaj ĉiuj, kiuj estis en la kafejo, eksilentis kaj ne disputis plu pri tio, kies religio estas pli bona.

Lev Tolstoj

La trezoro en la arbaro

La kanoto fine alproksimiĝis al la tero. La golfo etendiĝis, kaj breĉo en la blanka ondŝaŭmo sur la rifo montris, kie la rivereto elfluas en la maron; la pli densa kaj malhela verdo de la praarbaro montris ĝian vojon malsupren sur la malproksima deklivo. La arbaro ĉi tie tute apudis la marbordon. Je granda distanco, malklara kaj preskaŭ nubŝajna, leviĝis la montoj, kvazaŭ ondoj subite glaciigitaj. La maro estis trankvila, krom pro preskaŭ nerimarkebla ondmovado. La ĉielo brilegis.

La viro kun la skulptita padelilo ĉesigis sian laboron. "Devus esti ie ĉi tie," li diris. Li entiris la padelilon kaj etendis la brakojn rekte antaŭen.

La dua viro estis en la antaŭparto de la kanoto, zorge esploranta la teron. Li tenis sur la genuoj folion de flava papero.

"Venu, rigardu tion, Evans," li diris.

Ambaŭ viroj parolis per mallaŭta voĉo, kaj iliaj lipoj estis malmolaj kaj sekaj.

La viro nomata Evans venis, ekvilibrante, laŭlonge de la kanoto, ĝis li povis rigardi super la ŝultrojn de sia kunulo.

La paperaĵo havis la aspekton de kruda landkarto. Pro ofta faldiĝo ĝi estis ĉifita kaj frodita ĝis disiĝo, kaj la dua viro kuntenis la makulitajn fragmentojn, kie ili dividiĝis. Sur ĝi oni povis malklare deĉifri, en preskaŭ forviŝita kraĵonaĵo, la konturon de la golfo.

”Jen,” diris Evans, ”la rifo, kaj jen la breĉo.” Li transis la karton per la ungo.

”Tiu ĉi kurba kaj torda linio estas la rivero — taŭgus al mi trinketo, nuntempe! — kaj tiu ĉi stelo estas la loko!”

”Atentu tiun ĉi punktitan linion,” diris la viro tenanta la karton; ”ĝi estas rekta linio, kaj iras de la rifbreĉo ĝis grupeto da palmarboj. La stelo lokiĝas ĝuste tie, kie la linio tranĉas la riveron. Ni devos marki la lokon, kiam ni eniros la lagunon.”

”Enigmo estas,” diris Evans, post paŭzo, ”kion signifas tiuj ĉi subaj signetoj. Ŝajnas esti plano de domo aŭ io alia; sed kion signifas tiuj streketoj, jen tien, jen reen montrantaj, mi neniel povas imagi. Kaj kiallingva estas la skribaĵo?”

”La ĉina,” diris la viro kun la karto.

”Kompreneble! *Li* estis ĉino,” diris Evans.

”Ili ĉiuj estis,” diris la viro kun la karto.

Ambaŭ sidis dum kelkaj minutoj rigardante la teron, dum la kanoto malrapide vagnaĝis. Fine Evans rigardis al la padelilo.

”Estas nun via vico ĉe la padelilo, Hooker,” li diris.

Kaj lia kunulo kviete refaldis la karton, ĝin metis en sian poŝon, zorge preterpasis Evans, kaj komencis pade-
li. Liaj movoj estis sen energio, kvazaŭ de homo, kies forto preskaŭ eluziĝis.

Evans sidis kun duone fermitaj okuloj, rigardante la ŝaŭman koralrifon, kiu pli kaj pli alproksimiĝis. La ĉielo similis fornon, ĉar la suno preskaŭ atingis la zeniton. Kvankam ili estis tiel proksimaj al la trezoro, li ne sentis la ĝojegon kiun li atendis. La intensa ekscito de la barakto por la plano, kaj la longa nokta vojaĝo de la kontinento en kanoto ne provizita per manĝaĵoj, estis, por uzi lian propran frazon, ”elĉerpinta lin”. Li penis sin vekti direktante siajn pensojn al la orfandaĵoj, pri kiuj parolis la ĉino, sed li ne povis ilin restigi tie; ili tuj rekuris al imago pri freŝa akvo ondetanta en la rivero, kaj al la preskaŭ netolerebla sekeco de liaj lipoj kaj gorĝo. La ritma lavado de la maro sur la rifo jam aŭdiĝis, kaj dolĉe sonadis en liaj oreloj; la akvo preterlavis la flankon de la kanoto, kaj la padelilo gutadis post ĉiu puŝo. Baldaŭ li komencis dormeti.

Ankoraŭ li malklare konsciis pri la insulo, sed kun liaj sentoj interplektiĝis stranga sonĝo. Jam denove estis la nokto, kiam li kaj Hooker trafis la sekreton de la ĉino; li vidis la lunlumigitajn arbojn, la malgrandan fajron brulanta, kaj la nigrajn figurojn de la tri ĉinoj — je unu flanko arĝentumitajn per lunlumo, je la alia brilantajn pro la fajrolumo — kaj li aŭdis ilin paroli inter si anglaĉe — ĉar ili venis el malsamaj provincoj. Estis Hooker, kiu kiel unua kaptis la sencon de ilia parolado kaj mansignis al li, ke li aŭskultu. Fragmentoj de la konversacio estis neaŭdeblaj, kaj fragmentoj nekompreneblaj. Hispana galerego el la Filipinaj Insuloj nesaveble surteriĝinta, kaj ĝia trezoro enterigita por la tago de reveno, kuŝis en la fono de la rakonto; ŝipanaro malpliigita de malsano, unu-du kvereloj, kaj la necesoj de disciplino, kaj fine en boatoj foririnta kaj neniam ree priaŭdota. Sekvis, ke nur antaŭ unu jaro Ĉang-hi, vagante surtere, suriris la orfandaĵojn dum ducent jaroj kaŝitajn, forlasis sian jonkon, kaj reenterigis ilin per grandega laborado, senhelpe, sed tre sekure. Tiun sekurecon li tre emfazigis — ĝi estis sekreto lia. Nun li deziris helpon por reveni kaj elterigi ilin. Poste flirtiĝis la karteto kaj mallaŭtiĝis la voĉoj. Ja bela rakonto por aŭdiĝi al du senhavaj britaj sentaŭguloj!

La sonĝo de Evans antaŭeniris ĝis la momento, kiam li tenis en la mano harligon de Ĉang-hi. Vivo de ĉino

apenaŭ estas same sankta kiel tiu de eŭropano. La ruza vizaĝo de Ĉang-hi, unue akra kaj furioza kiel surprizita serpento, poste timema, perfidema, kaj petema, elstarigis super ĉio en la sonĝo. Fine Ĉang-hi ridetaĉis, en plej nekomprenebla kaj surpriza maniero. Subite la afero fariĝis tre malplaĉa, kiel ja foje okazas en sonĝoj.

Ĉang-hi babilaĉis kaj minacis al li. Li vidis en la sonĝo multoblajn amasojn da oro, kaj Ĉang-hi intervenanta, baraktanta par lin deteni for de ĝi. Li kaptis Ĉang-hi je la harligo — kiel granda estis la flava besto, kaj kiel li baraktadis kaj ridetaĉis! Li ankaŭ daŭre pligrandiĝis. Tiam la brilantaj oramasoj fariĝis muĝeganta forno, kaj vasta diablo, surprize simila al Ĉang-hi, sed kun grandega nigra vasto, komencis lin nutri per fajrokarbaĵo. Terure ĝi bruligis lian buŝon. Alia diablo lin vokis per nomo: "Evans, Evans, vi dormema stultulo!" — aŭ ĉu estis Hoo-ker?

Li vekigis. Ili estis en la enirejo al la laguno.

"Jen la tri palmarboj. Devas esti en linio kun tiu arbeto," diris lia kunulo. "Atentu tion. Se ni aliros tiujn arbetojn kaj tiam trabatos vojon en la densejon, laŭ rekta linio de tie ĉi, ni ĝin atingos, kiam ni atingos la rivereton."

Nun ili povis rimarki, kie la elfluejo de la rivereto plilarĝiĝas. Vidinte tion Evans reviviĝis. "Rapidu," li diris,

”aŭ, je la Ĉielo, mi devos ektrinki marakvon!” Li mordetis sian manon kaj rigardadis la argentan brileton inter la rokoj kaj la verda plektokreskaĵo.

Baldaŭ li turnis sin preskaŭ sovage al Hooker. ”Donu al *mi* la padelilon,” li diris.

Tiel ili venis al la riverelfluo. Iom progresinte kontraŭflue Hooker prenis da akvo en la mankavo, gustumis ĝin, kaj elkraĉis ĝin. Iom pli poste li provis denove. ”Tio taŭgos,” li diris, kaj ili komencis trinki avide.

”Malbenon je tio ĉi!” subite ekkriis Evans. ”Estas tro malrapide.” Kaj, sin klinante danĝere trans la antaŭparto de la kanoto, li komencis ensuĉi la akvon per la lipoj. Baldaŭ ili finis la trinkadon, kaj, enŝovinte la kanoton en malgrandan riverbrakon, ili intencis surteriĝi inter la densaj kreskaĵoj, kiuj pendis super la akvo.

”Ni devos nin interpuŝi tra tion ĉi al la marbordo por trovi la arbetaron kaj konstati la linion al la loko,” diris Evans.

”Pli bone estus, tien padeli ĉirkaŭe,” diris Hooker. Tial ili reŝovis la kanoton en la riveron kaj repadelis laŭflue ĝis la maro, kaj laŭlonge de la marbordo ĝis la loko, kie kreskis la arbetaro. Tie ĉi ili surteriĝis, trenis la malpezan kanoton malproksimen de la maro, kaj tiam sin direktis al la densejo, ĝis ili povis vidi la rifbreĉon kaj la arbetojn laŭ rekta linio. Evans estis preninta ilon sova-

ĝulan el la kanoto. Ĝi estis L-forma, kaj la transversa parto estis armita de polurita ŝtono. Hooker portis la padelilon. "Nun estas rekte en tiu ĉi direkto," li diris; "ni devas nin puŝadi tra tio ĉi, ĝis ni trafos la rivereton. Tiam ni devos esplori."

Ili sin puŝis tra densa interplektaĵo de kanoj, larĝaj folioj, kun junaj arboj, kaj komence la irado estis laciga, sed tre baldaŭ la arboj fariĝis pli grandaj kaj la tero sub iliaj piedoj pli libera. Laŭ nepercepteblaj gradoj la brilego de la sunlumo anstataŭiĝis per malvarmeta ombro. Fine la arboj fariĝis altegaj kolonoj, leviĝantaj malproksimen al superpenda baldakeno de verdaĵo. Malhele blankaj floroj pendis de siaj trunketoj, kaj ŝnursimilaj grimpkreskaĵoj pende etendiĝis de arbo al arbo. La ombro plidensiĝis. Sur la tero makulaj fungoj kaj ruĝbruna inkrustaĵo ofte montriĝis.

Evans tremetis. "Ŝajnas preskaŭ malvarme tie ĉi post la brulado ekstere."

"Mi esperas, ke ni sekvas la rektan vojon," diris Hooker. Baldaŭ ili ekvidis, je granda distanco antaŭe, fendon en la ombra mallumo, kie blankaj sagoj de varma sunbrilo enpenetris la arbaron. Ankaŭ vidiĝis brile verda subkreskaĵo kaj koloraj floroj. Tiam ili aŭdis la brufludon de akvo.

"Jen la rivero. Ni devus nun esti proksimaj al ĝi," diris Hooker.

La vegetaĵaro estis densa apud la riverbordo. Grandaj kreskaĵoj, ankoraŭ sennomaj, kreskis inter la radikoj de la altaj arboj, kaj etendis kvazaŭ kokardojn de grandegaj verdaj ventumiloj al la strio de ĉielo. Multaj floroj, kaj ia grimpkreskaĵo kun glatbrilaj folioj, sin alkroĉis al la nekovritaj trunketoj. Sur la akvo de la larĝa, trankvila lageto, kiun la trezorserĉantoj nun rigardis, naĝis grandaj ovalaj folioj kaj vaksosimila, roze-blanka floro ne malsimila al nimfeo. Pli malproksime, kie la rivero forkurbiĝis, la akvo subite ŝaŭmis kaj bruis en rapidaĵo.

”Nu?” diris Evans.

”Ni iom flankeniris el la rekto,” diris Hooker. ”Tio estis atendota.”

Li turniĝis kaj enrigardis la mallumajn, malvarmetajn ombrojn de la silenta arbaro malantaŭe. ”Se ni nin puŝos iome kontraŭ kaj kun la fluo ni devos ion trafi.”

”Vi diris —” komencis Evans.

”*Li* diris, ke estas amaso da ŝtonoj,” diris Hooker. La du viroj rigardis unu la alian dum momento.

”Unue ni provu iom kunflue,” diris Evans.

Ili antaŭeniris malrapide, scieme rigardante ĉirkaŭe. Subite Evans haltis. ”Kio je la diablo estas tio?” li diris.

Hooker rigardis laŭ la montrilo de lia fingro. ”Io blua,” li diris. Ĝi estis aperinta, tuj kiam ili venis al la supro de malalta ondaĵo de la tero. Tiam li distingis, kio ĝi estas.

Subite li antaŭeniris per rapidaj paŝoj, ĝis videbliĝis la korpo apartenanta al la malrigida mano kaj brako. Li pli firme manprenis la ilon, kiun li portis. La objekto estis korpo de ĉino, kuŝanta vizaĝaltere. La senzorgeco de la pozo ne estis malkomprenebla.

La du viroj pli proksimiĝis, kaj staris rigardantaj en silento la malbonsignan kadavron. Ĝi kuŝis en libera spaco inter la arboj. Proksime estis fosilo laŭ ĉina modelo, kaj pli for kuŝis disigita ŝtonamaso apud nove elfosita truon.

”Iu jam venis ĉi tien,” diris Hooker, purigante sian gorgon. Subite Evans komencis ĵuradi kaj furiozi, kaj piedfrapi la teron.

La vizaĝo de Hooker blankiĝis, sed li diris nenion. Li antaŭeniris al la sternita korpo. Li vidis, ke la kolo estas pufigita kaj purpura, kaj la manoj kaj maleoloj ŝvelintaj. ”Pah!” li diris, kaj subite sin forturnis kaj proksimiĝis al la elfosaĵo. Li faris krion de surprizo. Li kriege vokis al Evans, kiu sekvis lin malrapide.

”Vi stultulo! Ja bone estas. Ĝi restas ankoraŭ tie ĉi.” Tiam li sin returnis kaj rigardis la mortintan ĉinon, kaj denove la truon.

Evans rapidis al la truon. Jam duone malkovrita de la malfeliĉulo apude kuŝanta, montriĝis aro da malhele flavaj blokoj. Li kliniĝis en la truon, kaj foriginte la teron

per siaj nudaj manoj, rapide eltiris unu el la pezaj masoj. Dum li tiel faris, dorneto pikis lian manon. Li eltiris la maldikan pintaĵon per siaj fingroj, kaj levis la fandaĵon.

”Nur oro aŭ plumbo povus tiom pezi,” li diris ĝojege. Hooker rigardadis ankoraŭ la mortintan ĉinon. Li miris pri la afero.

”Li kaŝe antaŭvenis siajn amikojn,” li diris fine. ”Li venis ĉi tien sola, kaj iu venena serpento mortigis lin . . . Mi scivolas, kiel li trovis la lokon.”

Evans staris kun la fandaĵo en la manoj. Kiom signifis mortinta ĉino? ”Ni devos porti tiujn ĉi aĵojn al la kontinento popece, kaj tie enterigi ilin dum kelka tempo. Kiel ni portu ilin al la kanoto?”

Li demetis sian jakon kaj sternis ĝin sur la tero, kaj enĵetis du-tri fandaĵojn. Baldaŭ li trovis, ke ankoraŭ alia dorneto trapikis lian haŭton.

”Tio ĉi estas tiom, kiom mi povas porti,” li diris; kaj subite aldonis, kun stranga incitiĝo: ”Kion vi rigardadas?”

Hooker turniĝis al li. ”Mi ne povas toleri tiun . . .”

Li klinis la kapon al la kadavro. ”Ĝi tiel similas . . .”

”Sensencaĵo!” diris Evans. ”Ĉiuj ĉinoj similas unu la alian.”

Hooker rigardis en lian vizaĝon. ”Mi intencas enterigi tiun, ĉiuokaze, antaŭ ol mi helpos pri tiuj ĉi aĵoj.”

”Ne estu stultulo, Hooker,” diris Evans. ”Lasu resti tiun putraĵon.”

Hooker hezitis, kaj tiam okulumis la brunan ĉirkaŭantan teron. ”Iel, ĝi timigas min,” li diris.

”La demando estas,” diris Evans, ”kion ni faru pri tiuj fandaĵoj. Ĉu ni reenterigu ilin tie ĉi, aŭ transportu ilin trans la markolon en la kanoto?”

Hooker konsideris. En embaraso li rigardis jen la altan arbtrunkojn, jen la malproksiman, sunlumigitan verdaĵon supre. Denove li tremetis, vidante la bluan figuron de la ĉino. Li rigardis serĉeme en la grizan profundon inter la arboj.

”Kio okazis al vi, Hooker?” diris Evans. ”Ĉu via cerbo fuŝiĝis?”

”Almenaŭ, ni elprenu la oron el tie ĉi,” diris Hooker.

Li prenis en la manojn la finojn de la vesta kolumo, kaj Evans prenis la kontraŭajn angulojn, kaj ili levis la amason. ”Kien?” diris Evans. ”Ĉu al la kanoto?”

”Strange estas,” diris Evans, kiam ili antaŭeniris nur kelkajn paŝojn, ”sed ankoraŭ doloras al mi la brakoj pro tiu padelado.”

”Peston!” li diris. ”Sed ili ja doloras! Mi devas ripozi.”

Ili alterigis la veston. La vizaĝo de Evans jam blankiĝis, kaj sur lia frunto elstaris etaj ŝvitgutoj. ”Estas iom senaere en tiu ĉi arbaro.”

Tiam, subite kaj senracie koleriĝinte: "Kion valoras restadi tie ĉi la tutan tagon? Helpu min, mi diras! Vi ne ion faris krom revaĉi, de kiam ni vidis la senvivan ĉinon."

Hooker fikse rigardis la vizaĝon de sia kunulo. Li helpis relevi la veston kun la fandaĵoj, kaj ili antaŭeniris eble cent jardojn senparole. Evans komencis spiri peze. "Ĉu vi ne povas paroli?" li diris.

"Kio estas kun vi?" diris Hooker.

Evans faletis, kaj je tio, kun subita malbeno, forĵetis de si la veston. Li staris dum momento fikse rigardante al Hooker, kaj tiam kun ĝemo ekprenis sian gorĝon.

"Ne proksimiĝu al mi," li diris, kaj iris por sin apogi kontraŭ arbo. Poste per pli firma voĉo: "Mi resaniĝos post momento."

Baldaŭ senfortiĝis lia preno sur la arbo, kaj malrapide li malsuprenglitis laŭ la trunko, ĝis li fariĝis senforma amaso ĉe ĝia bazo. Liaj manoj kunpremiĝis konvulsie. Lia vizaĝo tordiĝis pro doloro. Hooker proksimiĝis al lin.

"Ne tuŝu min! Ne tuŝu min!" diris Evans per sufokita voĉo. "Remetu la oron sur la veston."

"Ĉu mi ne povas ion fari por vi?" diris Hooker.

"Remetu la oron sur la veston."

Dum Hooker manumis la fandaĵojn, li sentis piketon en la molaĵo de sia dikfingro. Rigardante la manon, li vidis maldikan dornon, eble je du coloj longan.

Evans ekkriis malklare kaj ruliĝis flanken.

Hooker lasis fali sian makzelon. Li fikse rigardis la dornon dum momento per larĝaj okuloj. Tiam li rigardis Evans, kiu kuntiriĝis sur la tero, kun la dorso spasme kurbiĝanta kaj malkurbiĝanta. Tiam, li trarigardis la arbkolonojn kaj la interplektitajn trunketojn de grimpkreskaĵoj, al la loko, kie en la malhela griza ombro malklare vidiĝis la bluestita korpo de la ĉino. Li pripensis la strekojn ĉe la angulo de la plano, kaj tuj li komprenis.

”Dio helpu min!” li diris. Ĉar la dornoj similis al tiuj, kiujn la Diakoj venenigas kaj uzas en siaj blovpafiloj. Li nun komprenis, kion intencis Ĉang-hi, certigante la sekurecon de sia trezoro. Li nun komprenis tiun ridetaĉon.

”Evans!” li ekkriis.

Sed Evans estis silenta kaj senmova, krom pro terura spasma ektordiĝo de liaj membroj. Profunda silento regis en la arbaro.

Tiam Hooker komencis suĉi freneze la etan ruĝan makulon sur la molaĵo de sia dikfingro — suĉi pro la kara vivo. Baldaŭ li sentis strangan pulsantan doloron en la brakoj kaj ŝultroj, kaj la fingroj ŝajnis malfacile flekseblaj. Je tio li sciis, ke suĉado neniel utilos.

Abrupte li ĉesis, kaj sidiĝinte apud la amaso da fandaĵoj, kaj apoginte la mentonon sur la manojn kaj la kubutojn sur la genuojn, li rigardadis la distorditan, sed

ankoraŭ tremetantan korpon de sia kunulo. Denove venis en liajn pensojn la ridetaĉo de Ĉang-hi. La obtuza doloro etendiĝis al lia gorĝo kaj grade pliintensiĝis. Malproksime super li dolĉa venteto susurigis la verdaĵon, kaj la blankaj petaloj de ia nekonata floro glitetis teren tra la mallumo.

H. G. Wells

El la angla lingvo tradukis C. J. Hindle

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-201-8